3a JARO — No 9 (28) ☆ MONATA ☆ JUNIO 1922

# Sennacieca Revuo

Mi ne volas esti **kreinto** de lingvo, mi volas nur esti **iniciatoro**.
L. L. Zamenhof

*Organo de la Tutmonda Laboristaro*

Antaŭe Esperantista Laboristo

*Jara abono:* Anglio, 5 ŝil.; Aŭstrio, 300 kr.; Belgio kaj Francio, 9 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 30 lev; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 25 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 6 kr.; Germanio kaj Finnlando, 25 mk.; Hispanio kaj Portugalio, 7 pes.; Hungario, 60 kr.; Italio, 12 lir.; Nederlando, 3 g.; Polio, 300 mk.; Svisio, 6 sv. fr.; Usono, 1 1/4 dol.
Oni pagu prefere per monbiletoj aŭ bankĉekoj. — La abonoj komenciĝas en Januaro kaj Julio.

Redakcio: **E. LANTY**
24, Boulevard Beaumarchais — PARIS XI (Francio)

Administracio: **L. GLODEAU**
177, Rue de Bagnolet — PARIS XX (Francio)

## S.A.T. pri la Mondlingva problemo

La esperantistoj partoprenas en granda kulturmovado: trudo al la socio de facile akirebla interkomprenigilo, komuna al ĉiuj homoj.

Tiel vasta problemo, pri kies solvo partoprenas multaj faktoroj: ideaj, sociaj, psikologiaj eĉ komercaj, ne devas esti konsiderata naiv- kaj kredemspirite. En Frankfurt ni devos priparoli tiun demandon kaj koncerne ĝin determini la pozicion de S. A. T. Tial, de nun, mi volas altiri la atenton de la kamaradaro pri tiu temo.

La esperantistoj ja renversis inter si la lingvajn barojn. Por ili la problemo povus esti rigardata kiel jam solvita. Tamen, ne estas necese longe pripensadi por ekvidi, ke la centmilionoj da aliaj homoj ne akceptos blinde kaj senekzamene la peresperantan solvon. Tion kredante ni riskus trafi en estonteco seniluziiĝon. Kaj estas ĉiam danĝere nutri sian spiriton per iluzioj.

"Esperanton ni volas aŭ nenion", diras iafoje fanatikuloj. Tia kredemaĉa spiritstato ne estas inda je la nobla celado por altrudo de mondlingvo. Ni devas malhelpi, ke ĝi eniru Satanion.

Kiel eble plej objektive ni do ekzamenu la demandon.

Kiel jamajn certaĵojn oni povas hodiaŭ konsideri la jenajn:

1e Kiun ajn lingvon oni alprenos, ĝi estos konstruita laŭ la principoj de esp-o; (1)

2e La definitiva solvo de l' problemo okazos nur per deviga instruado de la elektota lingvo en ĉiuj lernejoj de la plej ĉefaj Ŝtatoj.

3e La Registaroj alprenos artefaritan lingvon nur kiam en la praktiko tia idiomo estos jam sur granda skalo pruvinta sian taŭgecon.

Ĉe tiu starpunkto, mi opinias, ke ĉiu ajn sincera kaj nefanatika mondlingvano devas laŭte kaj publike deklari, ke li estas preta akcepti la decidon de *kompetenta* Komisiono, kies tasko estus elekti inter diversaj artefaritaj lingvoj. Ni ne timu diri, ke la interesatoj, t.e. la tuta homaro, ne devas plendi pro la ekzisto de multaj inter si konkurantaj projektoj.

Tio pruvas nur, ke la demando estas jam matura por ricevi praktikan kaj definitivan solvon.

Aliflanke, se la plibonigemuloj kontentiĝus *teorie* elprovi siajn lingvoprojektojn, ĉiuj larĝspiritaj mondlingvanoj devus ĝoji kaj eĉ iagrade subteni la penadon de perfektig-provantoj.

Sed la ĉefa demando estas unue montri praktike al la mondo, ke artefarita lingvo povas funkcii, vivi kaj disvastiĝi en ĉiuj medioj.

Tute pravaj estis do la esperantistoj, kiam ili interkonsentis pri la netuŝebleco de iu lingva bazo, ebliganta la instruadon kaj praktikadon de esp-o. Tie kuŝas certe ilia forto — kondiĉe, ke ili ne faru el sia *Fundamento* ian sanktaĵon, kies ĝiseternan adoradon ili volus trudi al la tuta mondo.

Cetere Zamenhof mem antaŭvidis la starigon de Komisiono por definitive juĝi pri la formo de la lingvo. En la antaŭparolo de *Fundamento de Esperanto* li diras: "Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la *registaroj* de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj registaroj per speciala *leĝo* garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, *se* tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj;"

1) Kiuj scipovas esp-on, tiuj povos do tre facile uzi la lingvon alprenotan, se okaze ne estus esp-o.

Nuntempe du Potencoj povus *praktike* solvi la demandon pri lingvo internacia: La *Ligo de Nacioj* kaj la *Rusa Registaro* kune kun la *IIIa Internacionalo*. (2)

Ŝajnaș al mi, ke S. A. T. agus saĝe, jam deklarante, ke ĝi estas preta akcepti la decidon de tiuj du *faktaj aŭtoritatoj*, se okaze ili volus *serioze* okupiĝi pri la praktika solvo (t. e. deviga instruado de la lingvo en ĉiuj landoj) de la mondlingva problemo.

Kompreneble tio estas nur mia persona opinio. La tuta Satanaro devas decidi pri la afero kaj starigi sian komunan vidpunkton. Sed, ĉar mi opinias, ke ĉiuj demandoj devas esti ade pripensataj, mi volis submeti mian propran juĝon al la diskutado de la tuta kamaradaro.

*E. Lanty*

# Frankfurt am Main

## La urbo de la IIa Kongreso de S.A.T.

Laŭ notoj kaj dokumentoj liveritaj de *Jean Roth*

**Historia skizo**: 2000 jarojn antaŭ Kristo jam viroj estas establitaj tie, kie kuŝas la nuna urbo kun siaj 450000 enloĝantoj.

Dum *794* solene kunvenis tie reprezentantoj de Imperio kaj Eklezio. Tiuepoke F. a. M. estis jam fortika urbo el la reĝoŝtato de la Frankoj (germana gento) kies imperiestro estis *Karlo la Granda*.



Karlo la Granda

Sub la regado de la Hohenstaufen'a familio(1138—1250) plurfoje kunvenis en F. a. M. Delegitaro, kies tasko estis decidi pri politikaj aferoj kaj elekti reĝon.


La urbo fariĝis libera (akiris sian administracian memregecon) en *1372*. En tiu epoko ĝi estis tre grava negococentro; du foiroj okazis ĉiujare.

Meze de la XIVa jarcento la korporacioj ribelis. Dum la malpacoj okazigitaj de la Reformacio Frankfurt a. M. ludis gravan rolon. En *1533* la protestantoj tie triumfis. Tio altiris en la urbo multajn eksterlandanojn, kiuj estis persekutitaj de la katolikoj.

De *1612* ĝis *1616* denove la korporacioj ribelis, sub la gvidado de *Vincent Fettmilch*. Dum la militoj faritaj de la Franca reĝo *Ludoviko* la XIVa la urbo tre suferis. La tiutempe regantaj patricioj premadis la popolon kaj ĉiel ŝteltrouzadis sian potencon. Pro tio ili estis tre malamataj.

En la unua triono de la XVIIIa jarcento, la burĝaro, apogite de la imperiestro, sukcesis ricevi de la aristokrataro la rajton partopreni la administradon de la financoj.

Sub la regado de princo *Primat Karl von Dalberg* (Grandduko depost 1810) la urbo tre prosperis: estis starigata la politika egaleco de ĉiuj ajn religioj, la financoj estis severe kontrolataj, la fortikaĵoj detruataj kaj la urbo ĉirkaŭata per zono de belaj promenejoj. Reformata estis la publika klerigado kaj la intelekta vivo ekfloris pro la instalo de sciencaj institutoj.



**Saalhof**

Restadejo de la iamaj princelekstistoj. Je la angulo la t. n. fera turo. En la malantaŭaĵo, la pinto de la katedralturo.

La politika graveco de F. a. M. kiel sidejo de la prireĝa Elektantaro, kaj kiel remparo de la germana unueco atingis sian plej altan gradon en *1848*, kiam kunvenis tie la parlamento.

En *1871*, estis ĉi-tie subsignata la packontrakto, kiu finis la Franc-Germanan militon. Tiu kontrakto ĝerme entenis la teruran lastan militon, kies Versailles'a packontrakto ankaŭ entenas la ĝermon de estonta milito, se la laboristoj el ĉiuj landoj ne forrenversas ĉie la abomenindan kapitalismon.

Kio plej honoras la urbon de nia IIa Kongreso estas, ke tie naskiĝis la glora, la granda Eŭropano *Johann Wolfgang Goethe*.



Goethe

**Vivkondiĉoj de la laboristoj**: Lastatempe la gazetaro publikigis, ke nur 377 laboristoj estas sen iu ajn okupo, kaj samtempe informas, ke ŝtata banko de Germanio pagas por ora monero (pacvaloro: 20 Mk.) 1200 paperomarkojn.


Antaŭ dek jaroj plej simpla stratbalaisto ricevis kiel semajnan salajron minimume tian ormoneron; lerta metiisto gajnis 30—35 markojn en laborsemajna tempo de 54 horoj. Nun ni ĝuas la 46-horan laborse-

2) Lastatempe aperis en diversaj komunistaj gazetoj informo pri "decido" de la *Komisiono por alpreno de internacia lingvo ĉe la IIIa Internacionalo*, pri kies starigo ni jam informis nian legantaron en la Ia no de S. R.. Mankas al mi aŭtentikaj dokumentoj por detale pritrakti la aferon. Mi hodiaŭ diru nur: 1) ke la kompetenteco de tiu komisiono por juĝi pri lingvaj aferoj ŝajnas treege dubinda; 2) ke jam mi konas faktojn pruvantajn, ke ne normale ĝi funkciis. Cetere ĝia "decido" favora por *ido* ne postulas, ke de nun la esp-istoj forlasu sian lingvon. Ni reparolos pri la afero.

majnon kaj la salajro estas, 600—800 markoj po semajne! Kompare kun la pacvaluto, la hodiaŭa salajro devus esti je 1200—2000 markoj! Tiu sumo estus nepre necesa por ke la familio povu aĉeti la plej necesajn nutraĵojn. Per la tiel montrita diferenco estas facile vidi en kia mizera situacio troviĝas la laborista klaso. Sed en nia urbo estas kelkcent milionuloj! . . .

La vivrimedoj de tago al tago plialtiĝas. Per la nuna salajro la laboristoj sukcesas aĉeti nur sufiĉe da nutraĵo por konservi la korpon laborkapabla; sed, se ili volas ŝpari por akiri iun vestaĵon aŭ alion, tion ili nur povas fari je la kosto de malsato.

Jen kelkaj ekzemploj pri la kareco de la vivrimedoj: Antaŭ la milito ovo kostis 4 pfenigojn; hodiaŭ, 4 markojn, kvankam printempe kokinoj preskaŭ ĉiutage ovonaskas; viando kostis antaŭmilite proksimume 40 pfenigojn po funto, hodiaŭ, 40 markojn; terpomoj, 2½ pfenigojn, nun 2½ markojn, ktp. . ktp. — Kaj la popolo restas muta, ne ribelas, pacience malsatas. . .



**Stacidomo**

**Politik- kaj sindikatorganizaĵoj**: En Frankfurt estas 3 laboristpartioj: 1) La *Malnova Socialista Partio* kiu nombras 13000 geanojn. Ĝia presorgano estas: *Popolvoĉo*, ĉiutaga, havanta 25000 abonantojn.; 2) La *Sendependa Socialista Partio*, kun 7000 m. Gazeto: *Popolrajto*, ĉiutaga, kun eldonkvanto de 10000 ekz.; 3) La *Komunista Partio*, la plej juna, al kiu nur la sinceraj revolucianoj aniĝis. Gazeto: *Komunisto*, kun 8000 legantoj.

La diversaj sindikatorganizaĵoj (23) nombras entute 103000 geanojn; la plej anoriĉa estas la fakorganizaĵo de la metallaboristoj kun 30000 gemembroj.

La kooperativoj, (konsumunuiĝoj) estas duspecaj: 1) la proletaria kun 30000 anoj; 2) la oficista kun 10000.

En la urba parlamento estas 38 socialistaj kaj 42 burĝaj deputatoj.

Resume, Frankfurt a. Main reprezentas tipon de burĝema, negoca urbo, kie estas tre agrable vivi por monhavantoj.

En venonta artikolo iomete ni raportos pri la vidindaĵoj.

**Ĉiam legu tre atente la „Informilon"**

# 2ª Kongreso de S. A. T.

sub honora Prezideco de *Romain Rolland*

## Frankfurt a. Main (Germanio)
## 12—16 aŭgusto 1922

5ª Komuniko

En sia lasta kunsido la Kongres-Komitato aranĝis jene la provizoran programon de la Kongreso:

**12 aŭgusto (sabato)**

je la 6ª vespere: malfermo de la Kongreso; familia kunveno de la S. A. T.-anoj.

**13 aŭgusto (dimanĉo)**

je la 9ª horo matene: unua laborkunsido; a) elekto de la Kongresestraro b) elekto de speciala komisiono kontrolanta la mandatojn de la delegitoj; c) elekto de speciala komisiono ekzamenonta la proponojn pri ŝanĝo de la statuto; ĉ) legado de la raporto pri la agado de S. A. T. inter la unua kaj dua Kongresoj; d) legado de la raporto pri la administrado de Sennacieca Revuo; e) legado de la raporto pri la redaktado de Sennacieca Revuo.

**14 aŭgusto (lundo)**

je la 9ª horo matene: dua laborkunsido; posttagmeze: daŭrigo. vespere je la 19ª: propaganda mitingo publika. Temo: esperanto je la servoj de l' tutmonda laboristaro; — paroldesegnado pri la organiz-sistemo de S. A. T.; — internacieco kaj sennacieco; — mallonga raporto de kelkaj Satanoj pri la ekonomia, socia, politika situacioj en sia respektiva lando; — komuna kantado de la "Internacio", k. t. p.. Ĉiuj esperantlingvaj paroladoj estos tradukataj germanlingven.

**15 aŭgusto (mardo)**

matene kaj posttagmeze: laborkunsidoj.

**16 aŭgusto (merkredo)**

je la 9ª horo: lasta kunsido de la Kongreso. (¹)

* * *

*Tria listo de aliĝoj ricevitaj ĝis 15ª aprilo:*

Kdo Antonio Barrot, Congreso 5155, Buenos Aires (Argentinio)
„ Konrad Deŭbler, Arcisstr. 48 II, München (Germ.)
„ Paul Janson, Kruggasse 2, Cassel (Germ.)
„ Rudolf Strauss, Scharrenstr. 10, Halle a. S. (Germ.)
„ Kurt Quell, Nostitz-Wallwitzstr. 6, Leipzig.

1) Kiel jam dirite, tiu programo estas nur *provizora*. Certe, ĉiu punkto, almenaŭ ĉiu laborkunsido postulas apartan programon, sed, niaopinie, estas preferinde atendi plue por starigi detalan kaj definitivan planon, ĉar espereble, ni ricevos sugestiojn kaj proponojn novajn.

1) Aliflanke, »ĉar nenio estas pli teda, laciga ol diskutado en varmega kongresejo, kaj ĉar la kongresanoj devas reveturi hejmen kun cerbo sana (!) tial la loka grupo Frankfurt'a aranĝos promenadojn kaj ekskursojn. Kvankam ne oficiala, konvenas publikigi tiun programon kiu, cetere, estos poste kompletigata.

1e) dimanĉon je la 2a posttagmeze: manifestacio antaŭ la monumento "la militviktimoj".

2e) je la 4a: rendevuo ĉe laboristfesto (kiuj volas ludi rolon en tiu festo·· kantado, deklamado, k. t. p., tiuj tuj sin anoncu al ni)

3e) merkredon posttagmeze: ekskurso al antikva kastelo "Saabburg" (Limoges), en la "Taŭnus"montaro; promenado tra la ban-urbo Homburg.

K^do Erich Lämmerhirt, Hirzelstr. 27 II, Leipzig.
„ Rudi Burda, Palackgnt un 152, Letna-Lobzy (Ĉekoslov.)
K^ino F. Suĵadinova, Petrograd (Rusio.)
K^do Bert Seubring, el Harlem (Nederlando)
„ Karl Riese, Brandvorwerkstr. 14, Leipzig.
„ Willy Keller, Piastenstr. 12, Breslaŭ (Germ.)
„ Willy Beyer, Düsseldorf (Germ.)
„ Karl Drehwald, Hufnagelstr. 9 ptr., Frankfurt a. M.
„ Friedrich Gaŭch, Sossenheimerstr. 6 II, Frankfurt a. M.
„ Ruperto Gomez, 28 avenue de la Respublique, Vitry le François (Fr.)
„ August Modest, Drachselstr. 8, München (Germ.)
„ Raguier, I rue du Marché Popincourt, Paris XI
K^ino Besnard Therèse, 22 rue Popincourt, Paris XI
Sume: 46 aliĝoj el 9 landoj.

*

Ĉiu ekzemplero de tiu ĉi numero entenas unu kongres-aliĝilon. Al ĉiu aboninto ni petas subskribi tiun aliĝilon, kaj ĝin sendi kun la kotizo *senprokraste* al kongres-Kasisto.

Atentigo: ne sendu difektitajn monbiletojn, ĉar tiakaze la banko deprenas asekur-pagon.

Subvencion de 1000 markoj germanaj por nia Dua donacis al la kongresa komitato la S.A.T.-grupo el Kristiania pere K^do Martin Muribo. Ni dankas tutkore al tiu grupo, por tia subteno. Kiu sekvos?

Rapidigu ge-kdoj pri la sendo de via kongreskotizo ĉar ni havas gravajn elspezojn.

*Jean Roth*
prezidanto de la K.-K.

# La aŭguroj en Ĝenova

En Ĝenovanun estas kunvenintaj la plej egaj eminentuloj, la plej grandaj fakuloj, la plej saĝaj gvidantoj de la nacioj. Sed tamen pli akre elrigardante mi opinias ekvidi sur iliaj vizaĝoj la rideton de aŭguroj.

Ili kunvenis por interkonsiliĝi, kiel plej bone la mondo povas esti elkondukata el la nuntempa mizerego al la bonfarto, el la nun reganta mallumo al lumo. Sed ĉu oni ekprenos la problemojn tiel simple, kiaj ili vere estas? Ne, tion mi ne kredas; ĉar la aŭguroj scias bone, ke ili estos superfluaj, kiam la regataj homoj ekkonos la realecon.

Ĉiu simplulo scias, ke la soldato ne laboras, ke li konsumas produktaĵojn de la laborantoj. Do plej simple estus maldungi la soldatojn kaj laborigi ilin. Sed nun, kiam la registaroj de ĉiuj aliaj gravaj popoloj konsentas pri senarmiĝo, nun estas sole la regantoj de Franclando, kiuj ne volas, ĝuste kiel Germanlando dum la packonferencoj en Haag. Oni interŝanĝis la rolojn.

Alia problemo. Ĉiu ŝtato forigis en sia teritorio la antaŭajn limimpostojn, saĝe dirante al si: la limimpostoj malhelpas la komercon kaj la ekfloradon de la diversaj ekonomiaj branĉoj tie kie ili trovas la plej bonajn kondiĉojn. Kial oni ne argumentas same saĝe konsiderante la nunajn impostlimojn inter la ŝtatoj? Kaj kiom da miloj da oficistoj, lokitaj laŭlonge de la landlimoj, multmilojn da kilometroj longaj, estas pagataj senutile, ja eĉ malutile!

Kaj la problemo de la valuto. Ĉu estas pli simpla problemo? Ekzistas ne unu ŝtato, kiu toleras en sia teritorio plurajn monsistemojn. Komparu, kiel ekzemple la germana regno tuj post 1871 malestigis la diversajn monsistemojn de la ŝtatoj el kiuj Germanlando kunfandiĝis. Kial oni ne sammaniere anstataŭas la diversajn valutojn de la diversaj ŝtatoj per unu sola valuto, por forigi por ĉiam la eternan ŝanceliĝon de la valutoj kaj por plifaciligi kiel eble plej multe la pagadon inter la diversaj partoj de la tuta tero? Tiam mi povos pagi ekzemple el Saksio al Paris aŭ al Prag same facile kaj malmultekoste kiel hodiaŭ el Saksujo al Berlin aŭ al München. Sed kiu profitas hodiaŭ plej multe per la diverseco de la valutoj? Ĉu oni pravas opiniante, ke la profituloj mem ŝanĝos tian staton? Apenaŭ.

En Ĝenova kunestas la plej eminentaj ŝtatistoj, por kuraci la suferantan mondon. Sed sur iliaj vizaĝoj mi ekvidas la ridetaĉon de aŭguroj.

Majon 1922 *P. Gl.*

# Homaj rajtoj pri ŝtato

Iĝinte el la tero, kiu portas kaj nutras la tutan homaron, naskite por vivi la homo havas la *rajton* vivi. Vivi ne signifas nur ekzisti en malsato, malspiriteco kaj senmora bruteco. Vivi signifas partopreni je ĉio, kio estas sur la tero, partopreni je feliĉo kaj ĝojo pri nia vivado kaj pri tiu de niaj kunvivantoj, de la kreskaĵoj kaj bestoj. Vivi ne nur signifas, en la plej favora okazo plenigi la ventron per terpomoj, sed ĝoji pri sunbrilo, florodoro kaj infana ridado.

La plej alta, plej sankta, netuŝebla rajto estas tiu de libereca decido, tiu de la senmalhelpata volo, kiu estas la antaŭkondiĉo por feliĉo. Krom tiu ĉi rajto, la rajto je la tero, kiu nin portas, estas la plej grava. Havi parton de ĝi tute senmalhelpate por la homo estas nepre necese, se la tero devas plenumi sian taskon, nutri lin. Kiel do povas esti utilaj al li la grandegaj kampoj de la riĉaj bienposedantoj kaj kial proletario ĝojus pro ili, se ili estas senkulturaj aŭ se sur ili kreskas grenajoj, kiuj ne estas por li, aŭ kiuj, en formo de alkoholo, estas destinataj, bestsimiligi lin, por ke li perdu la mezuron de siaj rajtoj.

Jes, de la popolo oni prenis unu el la plej gravaj rajtoj. Oni forrabis de ĝi la teron! Oni senheredigis ĝin! Kiom da fruktoj, do portus la grandaj senkulturaj kampoj, kiel abunda estus la popola nutriĝo, se en la landoj estus miloj da homoj, kiuj prilaborus kun ĝojo kaj zorgemo la teron, sciante ke ili laboras por si kaj por bonintencaj kunhomoj kaj ne por oravidaj eksplúatantoj. Kontraŭe la posedantoj de kampegaroj kulturigas tiujn sen zorgemo kaj sen amo al la tero, per maŝinoj, per malmultaj laboristoj en rapideco de monŝparemo. Tion dankas la tero tiel, ke ĝi nur portas malmultonon de normala kvanto. Pro tio la posedantoj ne ĉagrenas. Se ili rikoltas malmulton, ili denove altigas la prezojn kaj tamen ili gajnas tiom, ke post kelkaj jaroj ili nur bezonas la kampojn por rajdi aŭ ĉasi. Dume malsatadas ĉiuj, kiuj estas la plej granda parto de la homaro, la senheredigitoj, de kiuj oni rabis, kion ili posedis rajte pro naskiĝo kaj laŭ naturo.

De birdo prenu la flugilojn, de fiŝo la brankojn kaj ili mortos. Prenu de l'homo la teron kaj vi faras pli malbonon. La homo iĝas dependa kaj estas devigata servi, servi al tiuj, kiuj nun rikoltas sur la iam lia kampo la por li tiel necesajn nutraĵojn. Se la homo ne volas malsati, li devas servi por la rabintoj, kiuj diras: „Kiu ne volas labori, tiu ne manĝu.“ Tiu estas unu el

la unuaj leĝoj, kiujn faris la ekspluatantoj, kiam ili fondis la ŝtaton, kiujn ili faris por gardi la ŝtelitaĵon. Sed la prudento diras: Kiu ne estas manĝinta, ne kapablas labori, tial unue la homo havu laŭ siaj bezonoj.

Kaj da ili estas tiom multaj, kiuj nek havas ion por manĝi, nek havas propran dometon, kiuj devas laboradi kaj ŝviti nur por havigi al si la plej neceson. Kaj kiam ili vidas, ke dume la sinjoroj vivas en abundego kaj diboĉoj, ili ribelas kaj klopodas repreni la rabitaĵon, por ke ĝi en la manoj de pli laboremaj homoj servu al la tuthomaro. Sed tion antaŭsentis la potenculoj, kiuj mem ne emas kurbigi fingron labore, kiuj por propra bono malsatigas kaj ŝvitigas aliajn. Malkuraĝe, kiel estas rabistoj, ili dungis servemajn fihomojn, kiuj havas la taskon ŝirmi ilin kaj ilian havaĵon. Tiuj dungitoj ricevas ĉion por la materia vivo — almenaŭ pli ol la ekspluatatoj. De tempo al tempo ili ricevas piedpremon, por ke ili ne forgesu, ke ili nur estas servistoj; kaj por fari ilin fieraj je si mem, ili ricevas la nomon policistoj, servistoj de la justeco.

*

Por ke ĉia maljusteco ne tro montru sin, oni faris leĝojn. Oni diris: Kiu ŝtelas, tiu estu punota. Oni starigis registaron (en pli fruaj tempoj ĉion faris reĝo aŭ imperiestro kiel la unua servisto de la ŝtato mem), kiu eldonis leĝojn kaj, por gardi ilin (tio estas por gardi la ŝtaton aŭ rabinton), manĝigis policistaron aŭ armeon.

Se do ĉe ŝirmo de la propraĵo (rabitaĵo) kelkaj ribelantoj (akuzantoj) estis mortigitaj, oni devis fari novan leĝon, por ke tia krimo ne tro malplaĉu. "Ne mortigu", tiel oni diris por mortigante pravigi sin. La ribelantoj mortigas la pacemajn ŝtatanojn (sataj, rabemaj kanajloj) kaj pro tio ili devas esti punataj kaj por eviti la samajn krimojn estonte, plej bone per mortigo. Ĉar „mortigantoj estas konstanta danĝero por la homa societo". Antaŭ tio neniu pensis je mortigo kaj se tamen okazis tia escepto estis pro kolero kontraŭ la rabisto, kiu forrabis la teron. Sed nun oni ja havas leĝon "kontraŭ" la mortigo kaj oni diligente mortigadas, kompreneble nur la senheredigitojn kaj ekspluatatojn. Do, ne estas same, se du faras la samon. Se prirabito volas mortigi rabiston, tio estas peko. Sed la rabistoj laŭleĝe igas forbuĉi la ekspluatatojn por ĝui la rabitaĵon tute neĝenate. Sciĝu: La ŝtato estas la rabistaro, la ekspluatantoj, sklavigantoj; la leĝoj estas la vipo.

Por senheredigito nun restas nenio krom subiĝi, aprobi la leĝojn kaj vendi sian korpan forton nur por vivpovi. La aprobo de la leĝoj sufiĉas; tuj oni faras novajn, kiuj estas necesaj por doni la pravecon al la ekspluatantoj kaj por sufoki ĉiun plendon de la laboranta klaso. Kiam la sinjoroj deziras fari iun prihontindaĵon, ili faras novan leĝon kontraŭ tiu peko, por ĝin povi fari honore kaj senmalhelpate. Kvankam oni subpremadas la ekspluatatojn, kvankam oni sisteme venenumas ilin per alkoholo por malfunkciigi ilian intelekton, kvankam la riĉuloj hipokritadas, ofte erupcias la sana, laŭnatura prudento de la subprematoj. En tiaj horoj de timo kaj tremo la homaj vampiroj, la malkuraĝa fiaro elpensis novajn, vere diablajn rimedojn por malsaĝigi plejprofunde la popolon. Ili fondas la ŝtatan lernejon kun ĝia lerndevigo. Ili instruigas al la neinspiritaj laboristaj infanoj kiel bone zorgas por ili la patra ŝtato kaj la riĉuloj: Ili rajtas labori, saluti la sinjoron kaj unufoje en la vivo vidi la reĝon. Per la lernejo kun ĝiaj ŝtataj pedagogoj, kun ĝia instruado pri historio kaj ŝtatismo, per la katenado de la infanoj en la lerneja ĉambro kaj per korpaj punoj ili baldaŭ atingas, ke la naturo iĝis nekonata de la infano, kaj, ke la infano iĝis uzebla ŝtatano. La instruisto (pripagato kiel la policisto) mem ne plu sentas la mensogon, ke li jus instruinte pri la kristana dogmaro nun instruas pri ŝtatismo. Fine la infanoj scias parkere ĉiujn psalmojn kaj la nomojn de la ŝtataj institucioj, sed ili ne plu estas kapablaj legi en la libro de la naturo, de la vivo.

En la lernejo oni ankaŭ instruas pri patriotismo. Oni klarigas al la infanoj la ideon pri patrio, rabante de ili la ideon de hejmeco. De la domo l' sojlo, la cikonia nesto sur la tegmento, la herbejo apud la rivereto, la rifuĝejo je la sambuko aŭ siringo en la ĝardeno nun ne plu estas hejmo, sed ili estas patrio. La riĉuloj, kiuj en avido pro pliposedo minacas la najbaran landon, okaze iras por rabi. Ili kunvokas la ekspluatatojn kaj postulas helpon je la rabado, dirante, ke la najbaro minacas la patrion. La patrio estas ilia rabitaĵo kaj ili nomas ĝin la plej karaj havaĵoj de la popolo. Ekfluegas la alkoholo kaj la suferantoj en konstanta mizero febras je aventuroj por povi forresti el la ĉiutaga grizeco dum iom da tempo. La popolo malsaĝigita per lernejo kaj eklezio nepre kredas en fidela ŝtataneco kaj oferas sian vivon por konservi kaj plimultigi la rabitaĵon, samtempe donante al la sinjoraro novajn subpremrimedojn.

Ĝis tia grado la rabistoj kaj subpremistoj sukcesis. Ili prenis de la ekspluatatoj la rajton de libervola decido, rabinte de ili la penseblecon. Ili faris el ili spiritajn sklavojn, maŝinerojn, homojn de lasta grado, marioneton, kiu aktoras patriotismon, se oni tiras la fadenon, sur kiu estas skribita: La patrio, la plej sanktaj havaĵoj estas en danĝero. — La marioneta ŝtatano ne plu kapablas juĝi kio estas patrio kaj la plej sanktaj havaĵoj. Kaj senpripense li oferas sian vivon *(homan vivon!)*, kiu milfoje estas pli valora ol ĉiuj plej sanktaj havaĵoj de la tuta terglobo kune.

La "malamiko" minacas la patrion. La mortigado komenciĝas. Estis abomena mortigi por la libera homo, ĉar li, estante mem libera, lernis estimi la vivon de la kunvivanto. Se pli frue li okaze mortigis pro kolero, li mem estis responda al sia konscienco, kaj nur por propra intereso li mortigis. Hodiaŭ kiel ano de la ŝtato li mortigas laŭordone, por interesoj de aliuloj, senkolere, maŝinmaniere, fimalkuraĝe en subiĝema sklaveco. Li mortigas pro timo, ke la malamiko mortigus lin antaŭe. Li mortigas pro timo je puno. Kaj se li estas mortigita, li estis "heroo", kiu mortfalis sur la "kampo de la honoro".

Kampo de la malhonoro ĝi estas. Kampo de la hontindeco de la civilizacio, kampo de la despotismo, de la sklaveco, kampo de la pereo de la civilizacio kaj pereo de la homara bonfarto.

Kaj se post dezertiga militado estas mizero en la lando kaj la ekspluatitoj krias pro pano kaj pugnigas la manojn, oni faras novajn leĝojn. Kaj ili kun ĝojkrioj akceptas la "socialajn" leĝojn el la manoj de la subpremistoj. Kio helpas, ke kelkaj, malmultaj el la plej malriĉaj (la "ĉifonproletarioj") ekkonas la hipokritecon de la tuta leĝdonado kaj kontraŭprotestas. La granda amaso kaj la "meza kasto", kiun en saĝa gardemo oni metis kiel bufron inter si kaj la proletario, ambaŭ ne plu komprenas la ribelantojn. Lernejo kaj eklezio faris tro fundamentan malklerigan laboron. La soldato, estas preta pafi sur gepatrojn. Kaj Bismarck (aŭ Noske, tute egale) jam signalfingras.

Sed se foje la popolo ekkonas, ke per promesoj kaj paragrafoj ĝi ne povas satiĝi, ĝin ekokupas elementa kolero kaj movate per unu sola penso forpelegas ĉiujn subpremistojn kaj vantajn leĝfaremulojn, ĉiujn predikantojn de la ŝtata ordo.

Sed dum la popolo forpelas la iamajn subpremintojn, al ĝi ekestas novaj. Homoj, kiuj sciis flati al la popolo kaj kiuj sciis promesi al ĝi panon abundegan, nun komencas konstitui *leĝe* novan "ordon". Kaj dum la popolo streĉate observas la konstruon de nova leĝaro, ĝi forgesas la plej gravan, precipe, realproprigi al si la forrabitaĵon, ĉefe la teron kaj la produktilojn, kiujn ĝi mem kreis. Se ĝi ekkonas, ke la nova ordo estas same tiel, kiel la malnova, kaj nur la nomo ŝanĝiĝis kaj la nomoj de la

subpremistoj, jam estas tro malfrue. La respublika armeo nun devas gardi la respublikon, tute egale, ĉu ĝi estas bona aŭ malbona.

La gvidantoj, kiuj tiel bone konis la popolojn kaj ĝiajn bezonojn, nun forgesis ĉion. Ili ne komprenas, ke pano restas pano kaj ke ĝi ne estas anstataŭebla per paragrafoj kaj novaj promesoj. Kelkaj nur pro ambicio faris sian karieron kaj nun kiel respublika prezidanto prefere subskribas mortkondamnojn kontraŭ revoluciuloj aŭ kiel militministro gvidas la soldatojn de la iama monarĥo kontraŭ la malkontentuloj, kiuj ekkonis, ke demokratio kaj parlamento nur estas novaj rimedoj por obeemigi la amasojn. Kaj: "Kion vi do volas, vi ja mem per viaj deputitoj faris viajn leĝojn!". — Aliaj gvidantoj, kiuj estas bonintencaj, foriras el la ministerioj kaj parlamentoj aŭ estas forigataj. Aliaj hontas, sed ne volas konfesi kaj restas je siaj lokoj, dirante: Ankoraŭ ne estas la tempo. Nur la gloramaj pomppolitikistoj restas kaj regas por la bono de la kapitalistoj.

La popolaj deputitoj en la parlamento, eĉ kun la plej bona intenco, nenion povas fari por solvi la promesojn. Ili devas esti indulgaj pro la prezidanto, kiu estas de la sama partio, kaj kiu per aliigo de la "ordo" povus esti ĝenata en lia oportuneco. Ili iĝas konservativaj, ĉar ili la sistemon, kiun ili kreis, devas konservi, por ne ofendi sian propran ambicion. La radikaluloj montriĝas frenezegaj, ĝis ili akiros la celon kaj nun formas la registaron. Por tio ne bezonas esti ŝanĝiĝinta la situacio. La novaj viroj rigardas la situacion kiel sian propran faron eterne bonan, konservindan, do ili fariĝas konservativaj. Estas tute egale, al kiu tendenco ili apartenas, regante ili ĉiuokaze faras tion, kion faris siaj antaŭuloj — ili subpremas la popolon kaj helpas al la kapitalistoj ekspluati, ĝis ne plu ekzistos kapitalismo.

Sed tiu ĉi popolo iam ekkonos, ke ĉia registaro, ĉar ĝi neeviteble iĝas konservativa, ĉiuokaze subpremas la regataron aŭ malfavoras gravan parton de ĝi por la bono de la registaro mem kaj por la bono de siaj amikoj. La popolo ekkonos, ke ĉia leĝo estas kontraŭproletaria, kaj ke ĉiu leĝo postulas senfinan ĉenon de novaj leĝoj por kaŝi ĝian absurdecon. La popolo ekkonos, ke per parlamentbalotoj ĝi akiras nenion kaj ĝi ekkonos, ke la plej bonaj registaro aŭ ordo estas *neniaj* registaro aŭ ordo.

Se la popolo estos rehaviginta al si la teron, se ĝi ne plu suferadas, se ne plu ekzistas riĉuloj, la popolo scios, ke ne plu ĝi bezonas burĝajn "ordon", registaron kaj leĝaron. Ĉar: se ne ekzistas riĉuloj, oni ne plu ŝtelas. Ja ankaŭ neniu bezonas ŝteli, ĉar la tuta riĉaĵo sufiĉas al ĉiuj. Leĝoj kontraŭ ŝtelemo ne necesiĝos. Ankaŭ leĝojn kontraŭ mortigo oni ne plu bezonus. La mortigo pro rabemo malaperus kun la maljusta plihavo de kelkiuj. Ĉiu lernus estimi la vivon, honoron kaj sanon de la kunvivanto, ĉar neniu plu estus devigata vendi sian korpon, honoron, vivon aŭ sanon; oni eĉ povas esperi, ke pasiaj krimoj malaperos, per taŭga edukado kaj malapero de alkoholismo kaj rapidemo de la kapitalista vivmaniero. Neniu revos pri kolektado de riĉaĵoj, ĉar ĉiu havos sufiĉon por vivi, kaj la feliĉo de la libereco, de la vivo en reciproka ŝatado de altevoluintaj homoj de ĉiu prenos la avidon je malvarma metalo. Ni retrovenu al la naturo kaj refariĝu homoj, infanoj de la Tero. Ni evitu la disnervigajn "kulturakiraĵojn": alkoholon kaj pulvon, kaj ni nur bezonos unu leĝon: *Amu!*

Homo

# Atentu

**Ke de post la 1a Marto, la respondkuponoj valoras nur dum la 2 monatoj postaj al la ŝtampdato.**

# Pri Esperanto en Sovjet-Rusio

Pro apero, en la februara n° de "S. R.", de noto pri tiu temo, S° Edm. Privat petas, ke mi sciigu nian legantaron, ke en la priparolita afero li tute bonfide kaj honeste klopodis. Kvankam la informo ne respondis al fakto, ĝi tamen aperis en diversaj rusaj kaj polaj gazetoj. Ekzemple en la "Proletarij Svjazi" de 15 julio 1920 oni povis legi la jenon: "Burĝecaj registaroj starigis diversajn malhelpaĵojn por la studado de esp-o, ĉar ili antaŭsentis, ke la proletariaro de tuta mondo pere de esp-o, eniros en proksimajn interrilatojn, interkonsentos, kaj ian belan tagon la potenco de la kapitalo ĉie disfalos. Konsiderante tion, nia Sovjeta Registaro enkondukis la studadon de esp-o en diversaj lernejoj...... tiamaniere ke la rusa laboristaro povu interkompreniĝi kun laboristoj el Anglio, Francio, Germanio, Ĉinio kaj aliaj landoj sen helpo de tradukistoj."

Kompreneble, redaktoro de gazeto ne povas mem kontroli la sciigojn al li senditajn.

"*La instruo ne estas perdita kaj de nun ni zorgas ĉiam atendi la tekston mem de la decidoj*", konkludas en sia letero S° Privat. Mi konsentas kun tiuj saĝaj paroloj. Ni ĉiam lernu el la vivo, el la faktoj; ni formetu ĉiujn ajn okulvitrojn, ĉu verdajn ĉu ruĝajn, por kutimiĝi vidi nur la veran veron.

Tion dirinte, mi volonte konfesos, ke mi kredas je la maltrompemo de S° Edm. Privat. —

*E. L.*

## S. A. T.a Monkolekto por la Rusaj malsatuloj

**8-a listo de monoferantoj**

Olszanski (Guesnain) 15 fr.; G. P. de Bruin (Enschede) 20 fr.; Perrenoud (Le Locle) 5 fr.; M. F. (Orléans) 20 fr.; Laborista grupo de Lyon 40 fr.; J. Habert (Paris) 10 fr.; Gomez Ruperto (Vitry) 7 fr.; Kolekto ĉe propagandfesto de l'grupo de Villeurbanne 39.70 fr.; Dembowitz (Malakoff) 10 fr.; Kino Blanche Houyvet 20 fr.; E. Lanty 20 fr.; Kronenberg 200 Mk.; Preŝovà laborista grupo 57 kr. ĉek.; Paul Glöckner 10 Mk.; Richter kaj Lerchner (Leipzig) po ĉiu 50=100 Mk.; Berlin-okcidentanoj 57 Mk.

Kun la 7a listo: 326,70 fr. fr., 200 Mk. Pol., 57 kr. ĉek., 167 Mk. Germ.

La produkto de la 6 antaŭaj listoj estis uzata por pagi la unuan ekspedon de nutraĵoj al Rusio (legi la majan numeron).

## Municio por Sennacieca Revuo

**(Ricevita dum Aprilo)**

ANGLIO: Limouzin 18 fr.; — FRANCIO: Jouvie 1 fr.; Brochet 10 fr.; J. David 1 fr.; Kolekto Champeaux-Roux 15 fr.; Troula 3 fr.; Dembovitz 7,50 fr.; — GERMANIO: Buckler 5 Mk.; Georg Münch 5 Mk.; H. M. 5 Mk.; Weimann 20 Mk.; — JAPANIO: Kunitaro Fukuta 14 fr.; POLIO: M. Hermann 100 Mk.; L. Kronenberg 415 Mk.

Sume: 69,50 Fr.; 35 Mk. Germ; 515 Mk. Pol.

# PATRIO

## AL LA AMITINO

### El "Cherambault" de ROMAIN ROLLAND

Nenia sufero estas pli maldoĉa ol disiĝi de la amitino. Forŝirante ŝin de mia koro, estas mia koro, kiun mi forŝiras. La kara, la bona, la bela. — Se almenaŭ oni posedus la blindan privilegion de tiuj pasiaj amantoj, povantaj forgesi ĉion, la tutan amon, la tutan belon kaj bonon iaman, por vidi nur la malbonon, kiun hodiaŭ ŝi faras al ni kaj tion, kio ŝi fariĝis! Sed mi ne kapablas, mi ne kapablas forgesi; ĉiam cin mi vidos tian, kian mi cin amis, kiam mi kredis al ci, kiam ci estis mia gvidantino kaj mia plej bona amikino — Patrio! Kial ci forlasis min? Kial ci perfidis nin?




Nu, se nur mi estus la sola suferanto, mi kaŝus mian bedaŭrindan eltrovon sub mia pasinta amo. Sed mi vidas ciajn viktimojn, tiujn popolojn, tiujn junajn kredemulojn enamiĝintajn (en ili mi rekonas tiun, kiu ankaŭ mi estis)... Kiel ci trompis nin! Cia voĉo ŝajnis al ni tiu de frata amo; ci vokis nin al ci por nin unuigi: izoluloj plu ne estu! Ĉiuj estu fratoj! Al ĉiu el ni ci pruntis la fortojn de miloj da aliaj; ci igis nin ami nian ĉielon, nian teron kaj la verkon de niaj manoj; kaj cin amante ni ĉiuj amis unu la alian... Kien ci alkondukis nin? Unuigante nin, ĉu cia celo nur estis igi nin pli multnombraj, cele al malamo kaj mortigo! Ha! sufiĉis niaj personaj malamoj. Ĉiu havis la ŝarĝon el siaj malbonaj pensoj! Almenaŭ obeante ilin ni konsciis, ke ili estis malbonaj. Sed ci, venenulino de animoj, ci nomas ilin sanktaj...

Kial okazas tiuj bataloj? Ĉu por nia libereco? Ci sklavigas nin. Ĉu por nia konscienco? Ci ofendas ĝin. Ĉu por nia prospero? Ruinigita estas nia tero... Kaj ĉu ni bezonas novajn konkiraĵojn, kiam la kamparo de niaj patroj estas fariĝinta tro granda? Ĉu estas por la avideco de kelkaj formanĝemuloj? Ĉu la patrio havas kiel mision plenigi ties ventrojn per ĝenerala malfeliĉo?

Patrio fivendata al riĉuloj, al finegocistoj de l'animo kaj korpo de l'nacioj. Patrio kiu estas ilia kunkulpulo kaj asociano, kiu kovras iliajn malnoblaĵojn per cia heroa gesto — timu! Jen la horo kiam la popoloj forskuas siajn parazitkanajlaron, diaron, mastraron, kiuj trompas ilin! Ili persekutu inter si la kulpulojn! Rekte mi iras al la Mastro, kies ombro kovras ĉiujn. Ci, flegme tronanta, dum la multegoj sin interbuĉas je cia nomo, ci, kiun ĉiuj adoras sin intermalamante, inaĉo, rabema dio, falsa Kristo kiu ŝvebas super la interbuĉadoj kun ciaj krucitaj flugiloj kaj ciaj nizaj ungegoj! Kiu elŝiros cin el nia ĉielo? Kiu redonos al ni la sunon kaj la amon al niaj fratoj?... Sola mi estas, kaj havas nur mian voĉon, kiun blovo tuj mallaŭtigos. Sed antaŭ ol malaperi, mi krias: "Ci falos! Tirano, ci falos! La homaro volas vivi. Venos la tempo, kiam la homo rompos cian jugon el morto kaj mensogo. Venas la tempo. Jam venis la tempo".

El la franca tradukis *E. L.*

# Unu el la Reĝoj de Respubliko

De MAKSIM GORKIJ

(sekvo)

— Vi bone regas la religion, mi rimarkis.

— Ho, jes! mi konas ĝian valoron, li diris — mi ripetas al vi: la religio estas necesega por malriĉuloj, ĝi plaĉas al mi, sur la tero ĉio apartenas al diablo. La religio diras: Ho, homo, se ci volas savi cian animon, ne bedaŭru kaj nenion ŝtelu ĉi tie sur la tero. Ci ĝuos la vivon post la morto, en la ĉielo, ĉio estos por ci: Se la homoj kredas ĉi tion — estas facile mastrumi ilin. Jes. La religio estas oleo: ju pli abunde mi ŝmiras perĝi la maŝinon de l' vivo, des pli malgranda estas la interfrotado de ĝiaj partoj, des pli facila fariĝos la tasko de la maŝinisto.

Jes, li estas reĝo, mi konkludis kaj respekte demandis tiun de antaŭnelonge posteulon de porkpaŝtisto.

— Ĉu vi konsideras vin kiel bona kristano?

Ho, jes, certe! — li ekkriis konvinkplene. — Tamen, li eklevis la manon supren kaj diris impotone, — Samtempe mi estas Amerikano kaj, kiel tia, mi estas severa moralisto.

La mieno akiris dramecan esprimon, li antaŭenstreĉis la lipojn, kaj almoviĝis la orelojn al la nazo.

— Kion vi volas diri? mi demandis mallaŭtigante la voĉon.

Ĉi tio restu inter ni! li avertis min mallaŭte — Por Amerikano estas ne eble rekoni Kriston!

— Estas neeble? mi demandis murmurete, post paŭzo.

— Certe ne, li konfirmis ankaŭ murmurete.

— Sed pro kio, mi demandis post silento.

— Li estas bastardo! — La maljunulo ekpalpebrumis kaj ekrigardis ĉirkaŭen. Vi komprenas? Bastardo en Ameriko ne povas esti, ne nur Dio, sed eĉ ŝtata oficisto, nenie oni lin akceptas en konvena societo. Je li edziniĝos neniu fraŭlino. Ho, ni estas tre severaj! sed se ni rekonus Kriston, ni estus devigataj ĉiujn bastardojn konsideri kiel konvenajn homojn... eĉ se ili estus idoj de negro kaj blankulino. Pripensu kiom ĝi estus terura, ĉu ne?

Kredeble, tio estis efektive terura: la okuloj de la maljunulo verdiĝis kaj rondiĝis, kiel ĉe strigo. Li ekpene altiris la malsupran lipon supren kaj firme ĝin algluis al siaj dentoj. Verŝajne li opiniis, ke tia grimaco faros lian mienon imponanta kaj severa.

— Kaj negron, vi neniel povas konsideri lin kiel homon? — informiĝis mi, premita per la moralo de demokrata lando.

— Jen naiva demando! li ekkriis kun kompato — ili ja estas nigraj! kaj ili malbonodoras. Ni linĉas negron, eksciinte ke li vivis kun blankulino kiel kun edzino: tuj oni lin ĉirkaŭkolas per ŝnuro, kaj sur arbon! senprokraste! mi estas tre severa, koncerne moralon...

Li inspiris nun al mi respekton, kun kiu oni nevole rilatas al homa kadavro. Sed mi prenis sur min aferon, mi devas ĝin ĝisfini. Mi daŭrigis fari demandojn, volante plirapidigi la procedon de torturado de vero, libero, racio kaj ĉio, je kio mi kredas.

— Kia maniere vi rilatas al socialistoj!

— Ili ja nepre estas servantoj de diablo! li respondis rapide, ekfrapante per manplato sian genuon, socialistoj estas sablo en maŝino de l' vivo. Sablo kiu penetrante ĉion, malordigas la regulan funkciadon de la meĥanismo. Bona registaro ne devas havi socialistojn. En Usono ili naskiĝas: tio signifas, ke la homoj en Washington ne tute klare komprenas sian taskon, ili devas senigi la socialistojn je civitrajtoj. Ĉi jam estos io. Mi asertas ke la registaro devas esti pli proksima al la vivo. Pro tio ĝiaj anoj estas varbataj meze de milionuloj. Tiel!

— Vi estas tre tuteca homo! mi ripetis.

— Ho, jes! li konsentis, jesigkapklinante. Nun el lia vizaĝo tute malaperis ĉio oferema, kaj sur la vangoj vidiĝis profundaj sulkoj. Mi deziris lin demandi.

— Kiel vi rilatas... Mi komencis sed li eklevis la fingrojn kaj ekparolis mem.

— En la kapo de socialisto estas ateismo, kaj en la ventro anarĥiismo. Lia animo estas flugligita per diablo, per flugiloj de frenezaĵo kaj malboneco... Por batalo kontraŭ socialisto estas necese havi pli multe da religio kaj soldatoj. La religio kontraŭ ateismo, soldatoj kontraŭ anarĥio. De komence surŝutu kapon de socialisto per plumbo kaj ekleziaj predikoj. Se ĉi tio ne sanigos lin, tiam estu tie soldatoj por ĵeti plumbon en lian ventron!...

Li insiste kapklinis kaj firme parolis. "Estas granda la forto de diablo!"

— O jes, volonte konsentis mi.

Je l' unua fojo mi observis forton de influo de flava diablo — oro en tia hela formo. Sekaj de podagro kaj reŭmatismo la ostoj de la maljunulo, lia malforta, malvarma korpo en sako el malnova haŭto, tuta tiu-ĉi malgranda amato de malnova forjetindaĵo estis nuntempe entuziasmigita por malvarma kaj kruela volo de flava putro, de mensogo spirita de malĉasteco. La okuloj de la maljunulo brilis kiel du novaj moneroj kaj li tute fariĝis pli fortika kaj seka.

"Kion vi pensas pri la belarto?" mi demandis. Li ekrigardis al mi, preterpasis per sia mano sian vizaĝon kaj deviŝis de ĝi la mienon de malafabla kolero. Denove io infaneta aperis sur tiu ĉi vizaĝo.

— Kion vi diris? demandis li.

— Kion vi pensas pri la belarto?

— Ho! trankvile resonis li, mi ne pensas pri ĝi, sed simple aĉetas ĝin.

— Al mi ĉi tio estas kredinda, sed eble pri ĝi vi havas opiniojn kaj postulojn.

— Ha! kompreneble, mi havas postulojn... ĝi devas esti amuza ĉi tiu belarto, jen kion mi postulas. Estas necese, ke mi ridu. En mia okupado estas malmulte da ridado. Estas necese ŝprucigi la cerbon iafoje per io trankviliganta... Sed kelkfoje per io ekscitanta la korpan energion. Kiam belarton oni faras sur plafono aŭ sur muroj, ĝi devas eksciti apetiton. La reklamojn oni devas skribi per samaj helaj koloraĵoj. Necesas ke reklamo kaptu vin de malproksime per via nazo kaj tuj alkonduku tien, kien ĝi invitas. Tiam ĝi pravigos elspezon. La statuoj aŭ vazoj ĉiam estu prefere el bronzo ol el marmoro aŭ porcelano. La servistoj ne tiel ofte rompos kiel porcelanon. Estas tre bele batalado de kokoj kaj ĉaso al ratoj. Ĉi-tion mi vidis en Londono... tre bone. La bokso estas ankaŭ bona, sed devas okazi mortigoj. La muziko devas esti patriota; marŝario estas ĉiam bona, sed plej bonaj estas la usonaj. Usono, plej bona lando de l' tuta mondo. Jen pro kio usona muziko estas plej bona ol ĉiuj aliaj en la mondo. La bona muziko ĉiam estas tie, kie estas bonaj homoj. La amerikanoj estas plej bonaj homoj de l' mondo. Ĉe ni plimulte da mono. Neniu havas tiom da mono kiel ni, pro tio al ni baldaŭe alveturos la tuta mondo...

Mi aŭdis kun kia memkontenteco babiladis ĉi-tiu malsana infano kaj kun dankemo pensis pri la sovaĝuloj de Tasmanio, pri kiuj oni diras, ke ili ankoraŭ kanibalas, sed ĉe ili tamen estas disvolviĝinta la sento de estetiko.

— "Ĉu vi vizitas teatron?" mi demandis la maljunan sklavon de flava diablo por altigi lian fanfaronadon pri tiu ĉi lando, kiun li malpurigis per sia vivo.

Teatro! Ho jes! mi scias, ke tio-ĉi ankaŭ estas arto, respondis li kun aplombo.

— "Sed kio al vi plaĉas en teatro?"

— Estas bone, kiam troviĝas multe da sinjorinoj dekoltitaj, kaj ke vi sidas pli alte ol ili! li respondis, pripensinte.

— "Sed kion vi pli ŝatas en teatro?" mi demandis, sentante malesperon.

— "Ho!" ekkriis li, malfermante la buŝon laŭ la tuta larĝeco de l' vangoj, "kompreneble artistinojn kiel ĉiuj homoj. . . Se artistinoj estas belaj, junaj, ili ĉiam estas lertaj, sed estas malfacile diveni unuavide kiu fakte estas juna. Ili ĉiuj tiel bone ŝajnigas. Mi komprenas, tio-ĉi estas ilia metio. Sed iafoje oni pensas — ha! jen iu virgulino kaj troviĝas, ke ŝi havas 50 jarojn, kaj ŝi havis ne malpli ol du cent amulojn. Ĉi tio ja estas malagrabla. . .
La artistinoj de cirko estas pli taŭgaj ol artistinoj de teatro. Ili preskaŭ ĉiam estas pli junaj kaj pli elastaj. . ."
Videble li estis kompetentulo en ĉi tiu regiono. Eĉ mi, enradikiĝinta pekulo, tutan vivon dronita en malvirto, multon eksciis de li je l' unua fojo.

— Sed kiel al vi plaĉas la versoj? mi demandis lin.

— La versoj! redemandis li, mallevante la okulojn al siaj botoj kaj sulkinte la frunton. Li pripensis kaj streĉinte la kapon, montris al mi ĉiujn dentojn.

*El la rusa tradukis* **J. B.** (Daŭrigota.)

---

# Ĉu Jesuo vivis?

(Rimarkoj pri iu libro)

Je ĉi tiu titolo aperis 1910-e paroladaro, en kiu pro kaj kontraŭ diskutadis scienculoj kaj pastroj Berlinaj la demandon: "ĉu Jesuo vivis, ĉu li estas historia persono aŭ ne", kaj kiun diskuton *Drews*, la iniciatinto de granda diskutado, per tiu ekdeklaracio finis: "kiu ankoraŭ povos kredi al historia Jesuo, al tiu ni ne plu permesos ĉi tion". Plue li demandis siaflanke: "kio povas esti Jesuo ankoraŭ hodiaŭ por ni? Kiel historia persono nenio. Kiel ideo, kiel ideo de dihomeco ĉio, nome kiel fundamento de nova religio, kiel nova apogo de nia vivo, kiun ni perdis, kaj kiun ni denove akiri klopodas. Ĉi tion nomas li la pluan evolucion de Kristaneco".

Ĝenerale tiel ĉe li, kiel ĉe kun li en ĉi-diskuto similan opinion havantaj, sed ankaŭ ĉe la plej multaj scienculoj hodiaŭaj ni povas aserti kiel fakton, ke oni la religion, nome la kristanan neniam rigardas per veraj okuloj: do *laŭ vidpunkto de subpremitoj*, eĉ kvankam oni diras ĝin por intereso ilia, ĝi estas vere por domaĝo ilia.

Ni devas por ĉiam klariĝi kun tiu penso, ke religion nur la premanta societo bezonas, vera kultursocieto, kia estos la estonta, nur sciencon bezonos. Ĉiuj laŭdiraj doktrinoj, moralaj kaj socialaj reguloj de laŭdira Kristo estas komplekso de malmoralaj, kontraŭsocialaj kaj kontraŭprudentaj tezoj, ĉar moron starigi kiel leĝon estas jam mem malmoralo. Ne nur la evidenta cezaradoro de Kristo, sed la enĉizado de unu dikredo, do: de ĉiama tiraneco ("plisupra potenco devas ekzisti!") en la infanan senkulpan, kvankam por ĉio eman animon estas la plej granda malmoralo. La egoista doktrino pri la granda premio de supra mondo: preskaŭ por nenio ricevi multmilionjaran feliĉecon — kondukis nin al hodiaŭa rigida sistemo de kapitalismo. La ridindeco de fikomunismo pri "dividu ĉion, kion vi havas" estas antaŭ ĉiu ekfrapanta, ĉar nek unu milionulo, eĉ minimume la kredigantoj estas malsaĝaj por sekvi ĉi tiun doktrinon, ja la religio ekzistas akurate por rajtigi ilian malrajtan rajton.

"Estu anima malriĉulo" (ne kleriĝinto)[1]; "estu humila" (ne revoluciu); "malsatadu" (fastu); "donu sangon vian kaj tiun de viaj filoj al cezaro" produktis la penetradon de religio en lernejojn, do en sciencon, en ŝtaton, do en societon, en ekonomion, do en socialismon, en militistaron, do en tiranecon, kaj ve al la multaj kredantoj, ĉar ili fariĝis per la religio sklavoj de ĉi ĉiuj teruregaĵoj, katenoj, de siaj turmentegantoj.

Ne ekzistas eĉ unu tezo de religio, je kiuj ni ne povus brulstampi la kontraŭsocialan, do kontraŭpopolan signon.

Donu al malriĉulo el de li rabitaj milionoj kelkajn monerojn vi riĉegulo, kaj la religio akiras ankaŭ la nimbon al via friponeco; nomu vin servisto de l' dio, kaj vi estos sinjoro super la premitoj; asertu la plej absurdajn religiajn tezojn pozitive kiel "instrukciojn de l' dio", kaj la produktaĵojn de l' via malsaĝa cerbo la "animaj malriĉuloj" kiel diajn verecojn rigardos; diru vin malriĉa, vi riĉega pastro, kaj la plej malriĉegulo ankaŭ sian lastan moneron donacos al vi; blasfemu la sciencon, ĉi tiun solan verecon, kaj la ĉiam plimultaj "animaj malriĉuloj" vin rigardos kiel plej saĝan, kaj ili kune kun vi persekutos la saĝegulojn; malpermesu al malriĉulo la ŝtelon, la mortigon de l' *riĉuloj*, ĝis vi intertempe gaje asistadas en la amasa mortigo milita aŭ revolucia, en la elrabado komerca aŭ industria de *malriĉuloj*, kaj la miloj da malriĉuloj kunhelpos vian sangan rablaboron.

Vi malpermesas la individuan mortigon, ĉar la cezareco estas libera, la individuan mensogon, ĉar la religio estas libera, la individuan ŝtelon, ĉar la kapitalismo estas libera, kaj por tial devas ekzisti la religio, ĉar ĉi tiu estas pli grava kolono por subteni vian regadon ol la kruda perforto milita, ĉar vi nur ĝis tiam povas farigi la mizerulojn kiel instrumentojn de korpa teroro, ĝis ili estas sklavoj de spirita teroro.

Ĉi tion vi bonege scias, kaj tial vi eltrovis la Kristojn, la religiojn, la patrujojn kaj aliajn tiajn fiideojn, per kiuj vi la subjugigadon miljaran de l' homaro certigis.

La kunasocio de l' scienco kaj laboro estos tiu ekvacio, kiu vian prakonstitucion detruos.

Kaj tial ni kuraĝas tiun tezon starigi: ne alkonstrui, sed detrui oni devas la — bedaŭrinde — ekzistantan mondon de neniam ekzistinta Jesuo.

Tiu ŝtonego, sur kiu estas konstruita la sankta eklezio de l' privatposedo kaj tiraneco, ne nur en sia fundamento, en Kristo, sed ankaŭ en siaj ideoj kiel tute falsa pruviĝis, kaj la ekreviviĝo de l' homaro estos, se ĝi siajn malnovajn idolojn entombigis.

*R. A. Fanta*

---

(1) Ĉu ne estas erara tiu kompreno? Almenaŭ iuj komentistoj klarigas tiun frazon aliel. Jen: Riĉulo ne estu sklavece alligata al siaj riĉaĵoj; malriĉulo ne avidu riĉaĵojn, ĉar tiaokaze li estas nur fakte sed ne "anime malriĉa". Red.

---

**Ĉiu klaskonscia kaj konsekvenca esperantisto devas aniĝi S. A. T.!**
**Petu la novan statuton.**

---

**S. R. bezonas ankoraŭ 500 novajn abonantojn por ne plu bezoni monhelpon**



# La Angulo de l' Poetoj

## LA FLUTO DE PAN

*Al la anĝelaj "satanoj"*

*Ho vi lacaj, rompiĝintaj, malsanaj*
*Aŭskultu la voĉon de mia fluto,*
*Mi havas grandajn sekretojn, kiujn*
*Prirakontus mi al vi kun la ĝojo*
*Enondanta de feliĉa kuracisto,*
*Se al miaj fratoj, la herboj kaj arboj*
*Ne estus mi promesinta mutecon.*
*Tiel do mian korfendan sekreton*
*Malkaŝas al vi sole mia fluto:*
*Aŭskultu ho, fratoj, ĝian voĉon!*
*Venu kun mi vespere en l' arbaron*
*Kiam la suno malsupren ekiras*
*Lasante nin solaj. Sidiĝu sub la*
*Arboj en la herbo*
*Kaj silentiĝu.*
*Kaj aŭskultu*
*La fabelojn de maljunegaj arboj*
*La kanton dolĉan de l' arbetoj,*
*La preĝadon de la herboj, floroj.*
*Kaj la "kruda" "malamema" vento*
*Vidu, hejme je kia molega*
*Dolĉega tono flutas.*
*Ho mi scias bone, tiam ĉi vi volus*
*Eksplodi en maldolĉa malbenado*
*Pro via trompita, suferplena vivo,*
*Vi, pri anim' kaj korp' humiligitaj*
*Antaŭ la vera Dio kaj antaŭ vi mem.*
*Sed la eksupreniĝanta, el viaj koroj,*
*Simfonio de danko kaj feliĉo*
*Subigas tiujn malgajajn ariojn.*
*Kaj vi ne rekonas plu vin mem,*
*Vi ne kredas plu al nunaj scienculoj*
*Kiuj ne scias la animon de l' vivo,*
*Vi ne kredas plu al nunaj artistoj*
*Kiuj ne sentas la animon de l' vivo,*
*Vi eksentos tiun, kaj tio superos*
*Ĉion prisentitan, teran kaj ĉielan.*
*Kaj vi ne volos plu: kapojn kaj orelojn,*
*Nazojn kaj buŝojn, okulojn kaj fruntojn,*
*Vi ne sentos plu bonon kaj malbonon,*
*Kredon kaj malkredon, veron kaj malveron,*
*Vi ne suferos plu: blindecon, surdecon,*
*Ĉagrenon kaj venĝon, malgajon, volupton.*
*Mirinda, profunda, sonanta fonto*
*Fariĝos via animo, el kiu ĉiam freŝe*
*Ĉiam kantante ritmados la blanka*
*Ondaro de la vivo.*
*Ho kuniĝu do,*
*Manon en manon,*
*Animon en animon,*
*Kaj sekvu, sekvu ho*
*La voĉon sanktan de mia arĝenta fluto.*

de *Aladar Bán*

## *GESTO*

(El la poemaro "Pleureuses" de *Henri Barbusse*)

*Kiam nokto falas el ĉielo,*
*La senliman ĉambron mi eniras,*
*Kaj okulradio mia iras*
*Al la harmonio via bela.*


*Vin karesas per ornamo ia,*
*Muro, kiu multe ja vin amas.*
*Haroj viaj kvazaŭ oro flamas*
*Kun nuanc' pli bela ol ilia.*

*Kaj, videbla, via la rideto*
*Brilas en la nokto de la mondo.*
*Montras vin per fingro lazurondo*
*De la profundega fenestreto.*

*Kun fermataj lipoj, trembrilanta*
*En funebr', en floro, en rideto;*
*Plena je tremanta radieto,*
*Stel' vi estas, ĉion lumiganta.*

*En la ombro, kie nun mi estas,*
*Ĉi-vespere ja ridetas vi.*
*Rigardante malproksimen, mi*
*Aŭskultanta, kvazaŭ post preĝ' restas.*

Tradukis: *S. Frantz,*
membro de Esperantista Literatura Asocio.





# PEDAGOGIA FAKO

## Sekvoj de milito ĉe lernejo

Oficiala raporto de EDUKISTARA INTERNACIO

II

### ĜENERALAJ SEKVOJ

En unua ĉapitro (Kontraŭ Instruado pri Malamo), ni pritraktis reefikojn de milito ĉe Lernejo, de la nure pedagogia vidpunkto. En ĉi tiu dua ĉapitro, ni konsideras ĝiajn ĝeneralajn sekvojn, tiel bedaŭrindegajn, ke ili devigas nin deklari, ke la hieraŭaj esperoj de kelkaj grupoj el Instruistaro pri la medioj kaj metodoj demokrataj estas nun pro la milito tute elrevigitaj.

Kvin militjaroj hipertrofie grandigis la sociklasajn antagonismojn. La unuopa riĉeco supermezure ŝveliĝis, kaj paralele disvastiĝis la multegopa malriĉeco. La senkuraĝigaj militvundoj ĉie restas flegotaj. Kaj ankoraŭ ĉie, nenio estas en ordo. Ruinaj provincoj, financoj, ekonomiaj komplikiĝoj akaparas la tutan aktivecon de la nacio. Pri Instruado tute ne zorgas la burĝa ŝtato, krom ĝia sufokado. Ŝajnas neebla ĉia posta progreso! Ĉu ian ajn reformon ili konsideru, tiam la regantoj kredigas al ni, ke la maron ili plugas! Nekonebla restas Estonteco!

Juna Respubliko, en varbema impetiĝo, povis al si doni leĝojn por popolinstruado en 1881. Sed vane bataladis sinceraj evoluciemuloj, honestaj sed blindaj, por firmigi konkiraĵojn laikajn kaj socialajn, ĉar ĉiam estis eble al Reakciaj fortoj favorokaze de milito ruinigi plej belajn konkiraĵojn de paco.

Respubliko soldata kaj milita, kun botoj kaj kasko, ankoraŭ sin apogas sur sia glavo, sed per la libera mano, ĝi ne plu montre legigas sian idaron. Postmilita Franclando esperas pri la kruroj de siaj infanoj por trakuri la mondon, sed tute ne pri iliaj cerboj por gvidi ĝin kaj ĝin servi.

La tutaj militefikoj celis direkti al kazernoj kaj al batalfronto plimulton el la instruistoj. Multaj estis altranguloj en la armeo: el ili okazis hekatombo. Ĉiumonate la bultenoj de la t. n. "Kolegaj Amikaroj" sciigis nin pri listo de novaj viktimoj. Oftege nia federacia gazeto „Emancipata Lernejo" kaj niaj sindikataj bultenoj informis nin, ke kelkaj el niaj propagandistoj ne plu socie batalos apud ni. Falis en la sanga miksbatalego niaj amikoj CHALOPIN, SALABELLE, LETOURNEAU ... pri kiuj ni ĉi tiam emocie funebras. Preskaŭ 10000 instruistoj aŭ instruisto-studentoj ja restis sur la batalejo. Tro multaj reiris sian lernejon kripligite aŭ maltaŭgigite por sia ofico.

Dum oktobro 1914, la lernantoj eniris la lernejon kun nova geinstruistaro antaŭ si. Oni vokis la instruistinojn por anstataŭi la edzojn kaj oni denove anstataŭigis ilin. Dum kvin lernjaroj estis senĉesaj anstataŭoj kaj reanstataŭoj. Estis same en la real-ernejoj, gimnazioj, kaj fakultatoj, en kiuj oni petis helpon de profesoroj improvizaj.

La germanaj armeoj estis invadintaj ok departementojn, kaj pelintaj novajn gelernantojn al niaj centraj lernejoj. En superplenaj lernoĉambroj la instruistinaro rapide laca uzis kaj trouzis forpermesajn ripoztagojn. Oni akceptis helpon de tute junaj anstataŭantinoj, kiam sin prezentis kelkaj kun konsento de Administracio. Kiam ial ajn la lernoĉambro estis sen geinstruistoj, la gelernantoj disiĝis ope en la aliajn ĉambrojn de la lernejo.

Ni ne forgesu atentigi, ke tro multaj lernejoj ne estis remalfermataj dum oktobro 1914. Ilin okupis soldatoj aŭ oni uzis kiel hospitalojn. Porinstruistaj lernejoj, realaj lerneoj, liceoj, kolegioj tiel atendis jarojn antaŭ ol esti redonitaj tute aŭ parte al instruada servo. Kelkaj edukejoj estas neniam forlasitaj de la militadministracio.

Gravaj difektoj estis farataj en la ĉambroj. La lerneja remalfermo okazis laŭ bedaŭrindegaj kondiĉoj pri higieno. Sed milito ne havas leĝojn ...

Pro diversaj kaŭzoj la anstataŭa instruantinaro akiris sufiĉe malbonan famon.

Ni tute ne volas juĝi maldece niajn junajn kamaradinojn, kiujn milito enkondukis en niajn vicojn. Ni scias, ke multaj el ili posedas la "superan diplomon" kaj la "Ateston pri pedagogia kapableco" sed ni ankaŭ scias, ke aliaj tute junaj aŭ pro milito vidvinoj estis nur mezinstruitaj kaj tute senspertaj.

Ĉi tiuj farîs, malprofite al infano kaj laŭ ne tre bonaj kondiĉoj, longan kaj neprofitan profesian lernadon. Jen ili antaŭvidetis neeviteblan eksigon (suspendon) kaj elmontris malmultan diligentecon en sia laboro, jen esperigite ili postulas ankoraŭ nun sian meritatan envicigon en la oficialan geinstruistaron al ili ĉiam obstine fermitan.

Preskaŭ ĉiuj estis sendefenda rabaĵo al militemo, kaj ilia instruado estis de tio malbone influita.

La krizo korporacia pri "reenvicigo" kies venkon nia federacio devas klopodi plejprofite al infanoj kaj al postulantinoj, estas intime kunligata kun la problemo pri la "neforigado" de la lernejoficoj (postenoj), pri "emeritigo" de la 55 jaruloj (eksigo per pensio), kaj pri "multigo" de la lernĉambroj en la troplenaj lernejoj.

De 1914 ĝis 1918, la lerneja vizitado de la infanoj estis malbona. Patro estis en armeoj, kaj patrino en laborejo: hejma kunvivado estis rompita. Necesege la pliaĝa filo estis laboronta aŭ la pliaĝa filino en la hejmo restu por patrine mastrumi. Tro multaj vagemaj infanoj vagadis sur la strato anstataŭ iri lernejon. La punrimedoj kontraŭ lerneja foresto restis neaplikataj. En la hejmo vespere la patrino, sola, laca aŭ senaŭtoritata ne povis kontroli la lernolaboron.

La ŝtatadministracio seninteresiĝis pri la lernejvizitado. Male ĝi rekomendis al la kamparaj gelernejanoj partopreni la kampajn laborojn. "Vi plejkonsente permesos al la gelernantoj vizitadantaj vian lernejon, ke ili helpu siajn gepatrojn aŭ eĉ ili dungiĝu serve al aliaj terkulturistoj. Vi lasos foriri, dum la lernolaboro matena aŭ vespera, tiujn, kiuj povus dividi sian tempon por lernejo kaj por kampoj". Tiel skribis en la departemento "Maine et Loire" la Direktoro de l'Instruado ... (Bulteno de unuagrada instruado 1916, n° 26). Oni ne povus pli senkaŝe instigi la gepatrojn ekspluati la infanaron, kaj instigi la infanojn pli preferi kampan liberecon ol lernejlaboron.

Tio nun fariĝis kutimo. Nune la promilita vidvino ricevas nesufiĉan pension; la kunulino de la militinvalido restas en laborejo por alporti ioman plikomforton en la hejmon, ĉar multekostas la vivado. La infanon oni vokas por helpi la gepatrojn en kampolaboroj aŭ oni ĝin faras ŝafgardisto, metilernanto. Pri Instruado, Lernejvizitado kaj Plilongigo de la lerndaŭro, Franclando senzorge lasis ĉiujn Eŭropajn landojn preterpasi.

La ĝenerala multekosteco triobligis la koston de la pensioneco en la edukinternulejoj: tial multaj gepatroj, dezirintaj elinstruigi siajn infanojn aŭ inciti ilin al fakaj studoj, estas haltigitaj de tro multaj elspezoj. Tiel la lando estas senigata je praktikistoj instruitaj por industrio, agrikulturo kaj komerco.

La rezultatoj de tia situacio frue elmontriĝis; la intelekta nivelo rapide malaltiĝis, neniun surprizante.

Ĉe la ekzamenoj pri unuagrada lernatesto, la verkaĵoj spegulis kaj ankoraŭ spegulas evidentan nesufiĉan instruadon. — Ni tute ne indignas pro tio, ke niaj gelernantoj parolas senorde pri Ludoviko la 14a. Ni ja publike mallaŭdegas kun Georges Sorel la demokratojn, kiuj "anstataŭ instrui la laboristojn, pri kio ili bezonas scii por sia laborista vivo, penas en ili grandigi akran scivolemon pri aferoj troviĝantaj en libroj verkitaj por amuzi la burĝojn". Sed al ni plaĉas memori pri tute freŝa pasinteco, de kiu estanteco estas tute penetrita, kaj kiu estas instruriĉa por estonteco.

Ĉe la ekzamenoj por stipendiuloj de reallernejoj, gimnazioj, ni diru: ĉe ĉiugradaj ekzamenoj, oni ĉagrene konstatis, ke estis granda malstreĉeco en la lernlaboro.

Ĉe kandidatoj al porinstruistaj lernejoj oni konstatis ofte veran intelektan mankon. Oni ja rakontas ridetante, ke tro multaj kandidatoj postmilite ricevintaj la ateston por inspektado en la unuagradaj lernejoj verkis por tio nur "infanajn taskojn?"

Ni kredas, ke ankaŭ ni scias, ke en fakultatoj licenciatajn kaj doktorajn atestojn sukcesis akiri ne ĉiam kandidatoj pli ol kvin jarojn militintaj, sed prefere oni konsente donacis al studentoj nur studintaj en tranĉeoj, staboj kaj... tavernoj (luksaj drinkejoj).

* * *

La milito estis terura "skuo" ja vekinta multe da novaj komprenoj, kaj decidinta aŭdacajn kreojn: sed ĝi ne modifis la ekskutimajn konceptadojn de la ŝtataj instruestroj pri instruado, kies rutineca irado bone malbone daŭras.

Tamen por la estonteco de la raso kaj de l'armeo, por la saneco de la militistaj instruktoroj, oni rekomendis en ĉiuj lernejoj la ĝeneralan aplikadon de la metodo pri korpekzercado, t. n. "Joinville 'a metodo".

Ni nenion diros pri la korpekzercado tia, kia ni vidis ĝin instruatan aŭ tia, kia ni mem ĝin instruas, se ĝi celas nur individuan perfektigon. Sed ni malebligos soldatemigon de la lernejo, ni denuncos la neeviteblajn troigojn, kiuj transpaŝas la difinitan celon, kaj ankaŭ ni denuncos la erarojn de la instruktoroj kaj inspektoroj tro emaj imagi lernejon kvazaŭ kazerno.

Ni protestos kontraŭ tio, ke en la lernejon eniras la militisto, kiun povas altrudi la inspektoroj "se ili ne juĝas la instruistajn rezultatojn kontentigajn". Kvankam ili deklaras, ke la penado de l'instruisto estas celonta "igi senutila la monitoron (militinstruktoro)" ni post oftaj konstategoj ja scias, ke "provizoreco" facile fariĝas "definitiveco".

Ni ankaŭ bedaŭregas, ke la ŝtatinstruistaro ne havas sian "Join ville'an lernejon" gimnastikan sed nemilitistan, civilan kaj specialigitan pri instruado al infanoj kaj viriĝantoj, kaj ke la Instruada Servo ne havas samajn monrimedojn, kiajn armeo disponas.

Ni fine kontrolos la agadon de la klerikaluloj, kiuj fariĝas por logi junularon harditaj marŝamantoj kaj bravaj sportuloj, kaj intrigas sukcese por oficialigi de la Registaro siajn societojn klare politikecajn kaj ekleziecajn.

* * *

Ĉu nur tiuj diritaj faktoj estas la sekvoj de la milito ĉe la lernejo? Ni grandege erarus se ni kontentiĝus per tiuj flankaj konstatoj. Malbonó estas ja multe pli profunda kaj des pli nerebonigebla Militon! Vi ja konas! Ĝi estas la rega potenco forprenita el la manoj de la demokratoj — kion ajn estu pri tio dirinta Sro Painlevé — kaj transdonata al la milita stabo kaj al la ŝtatistoj necedemaj, ĉiuj inspiritaj de la pastraro, kies superregada sperto estas duoble miljara! Ĝi estas diktaturo altrudata al la lando! Ĝi estas letargia dormetado injektatan en la popolon! Ĝi estas la estrado dummilita kaj postmilita de la perforta kaj sovaĝa reakcio! Ĝi estas espero kulturata en la koro de la plej fiaj reakciuloj! Ĝi estas la reveno al retropolitiko celanta renverson de ĉiuj institucioj penege tirakiritaj unu post alia!

Jen ĵus "de facto" restarigita la ambasadoreco ĉe "Vatikano" (papejo) kaj eklezaj privataj lernejoj ricevantaj subvenciojn kaŝitajn aŭ malkaŝitajn de la komunumoj, de la departementoj aŭ de la ŝtato. Elzaco rekonkirita restas kun instruada leĝo malobeeganta neŭtralecon kaj laikecon, kaj daŭrigas sian ekzistadon, kiel klerikala insuleto inter Francio klerikaliĝanta kaj Germanio liberiĝanta.

Ĝi estas la publikinstruada ministro aŭdacanta sendi cirkuleron insultegan, atakofendon kontraŭ opinirajto kaj respekto al oficistoj de la instruada servo! Ĉu ne ja kun aplaŭdoj de la tuta reakciularo la sindikalistaj geinstruistoj estas persekutataj ĝis la tribunaloj?

Certe por favori la privatajn (religiemajn) lernejojn kaj helpi ties prosperan plimultigon oni fermas multajn publikajn lernejojn. Per tia retroira evoluo la publikaj gimnazioj malpleniĝas profite al jezuitaj lernejoj. Ĉar pro ricevita salajro oni malebligas al ni esprimon de nia opinio, tial lertaj pastroj ne hezitas veni ĝis la pordo de niaj lernejoj por atendi niajn gelernantojn, kaj ilin konduki al religiemaj grupoj, kie per metodo neĝendarma ili scias allogi la infanojn.

Ekkrias vi, kamaradoj, "Tio estas ja antiklerikalismo!" Ne! Ĉar Eklezion aparte ni ne rekte atakas (kvankam ni scias bone, ke oni ne devas ĝin samigi kun Religio) — — — sed certe kapitalismon, ni atakas tute kaj senrezerve de Eklezio servatan. Kiam kapitalismo estos renversita, tiam Eklezio sekiĝos kvazaŭ falinta folio.

Propra sekvo de milito estis, ke ĝi konfirmis nian revolucian tezon senmaskigi burĝaron. Fariĝas evidente al spirito de la homoj malplej avertitaj, ke la nobelaĉoj de la komerco — postmilitaj mastroj per 120 multmilionuloj memzorgantaj en Parlamento pri siaj negocoj — ne plu provas maski, malantaŭ idealo kara al Condorcet — sian intencon pri laika lernejo. Tute male ili lasas ĝin malsupreniri la mortigan deklivon, kaj sin returnas kun etendita mano al malnova kaj potenca Eklezio.

Oficisto de la ministerio pri publikinstruado, atentigita pri la malfacila rekrutigado de instruistoj aŭdacis respondi, ke por li sufiĉas "havi kamparanojn por instrui aliajn kamparanojn pri legarto". Oni ne povas pli cinike malkonfesi la instruado-programon de la malnovaj pioniroj de la IIIa Respubliko.

Sro Herriot, urbestro kaj deputato el Lyon-rigorega radikalano, raportinto pri la publikinstruada budĝeto en 1921, konstatis ĉe Parlamenta tribuno, ke neniu el la reformoj de li rekomendegitaj, antaŭe ne estas efektivigitaj. Tial, tiun ĉi jaron, li sin kontentigis per "seka financa raporteto".

Ŝtato respublika disdonas apenaŭ 500 stipendiojn por duagrada instruado al kelkaj elektinduloj el niaj 5 milionoj da unuagradaj gelernantoj! Eĉ per tiuj stipendioj la gepatroj tute ne povas liveri la vivnecesaĵojn al siaj infanoj en la gimnazioj dum la difinita lernotempo. Tion ja deziregas la burĝaro.

Por karakterizi la seninteresiĝon de la altaj registaj medioj eĉ pri scienculoj, ni diru, ke la glorega Branly estas por vivi devigata private lekcii, kaj ke Sino Curie disponas por siaj sciencaj esploroj la ridindan sumon de 12000 frankoj.

Rilate al geinstruistaro, ĉie regas maljusteco. Niaj 25—30 jaraj junaj gekamaradoj restas trompitaj pri sia salajro; tiuj el la "invaditaj" regionoj estas minacataj en sia promociiĝo. Leĝo de la 30a de Aprilo 1921 pri klasigo de la geinstruistoj kaj de la oficurboj (postenoj), ebligas arbitran elekton, kreas privilegiojn, kaj malpacige dividas la geinstruistaron. Oni ankaŭ eĉ projektas konfirmi per leĝo, ke avantaĝojn ricevos publikoficistoj pro sia rango aŭ servotempo ĉe l'armeoj!

* * *

Por taŭge montri la herede naturan senpovecon de la burĝa demokratio pri popolinstruado, sufiĉas observi la praktikajn rezultatojn de niaj ĉiujaraj pedagogiaj prelegoj. Lastjare la ministro decidis pritrakton de la demando pri lerneja higieno. Estis niaopinie tre grava debato ĉar temis ekzameni "kiajn praktikajn ekzercojn" oni povus altrudi al la infanoj por al ili akirigi "nedetrueblajn kutimojn pri pureco, sobreco, kaj saneco."

En tuta Franclando, unuagradaj instruestroj pri tiu temo paroladis kaj redaktis longajn raportojn. Sed oni decidis nenion, kaj nenion decidos. Dum oni ĵetelspezas miliardojn da frankoj al abismo de malproksimaj militekspedicioj, niaj gelernantoj loĝas en mallumaj lernoĉambroj, neniam desinfektitaj, kun por sia servo materialo malnova nesufiĉa kaj eluzita. La gelernantoj havas nek tualetajn lavejojn, nek kombilojn, banpelvojn, bankuvojn . . k. t. p.

Ni estas ja devigataj por modelo turnigi niajn estrojn de l' instruada servo al la komisarejo de la publika higieno en Sovjeta Ruslando, kaj tion ni tre volonte faras!

Kaj fine estas superega reformo por kiu kelkaj socialistemaj intelektuloj kaj sindikalistaj akordemuloj vante muzikas, kaj por kiu nia federacio batalas kaj preparas la publikopinion: t. e. la Reformo pri "Uniforma Lernejo".

Ni konstatas ke egaleco de l' infanoj pri instruado, bela revolucia ideo, ne estas kaj neniam estos fakto en burĝara reĝimo.

Por eviti al riĉulidoj, de jam infanaĝo, kunmiksaĉon kun proletarioj, oni fondis unuagradajn lernoklasojn en la gimnazioj, kie jam prepariĝas la intelekta supereco de l' elektita infanaro super tiu el niaj unuagradaj lernejoj.

Reallernejo formanta laboristojn estas senpaga, sed gimnazio modeledukanta regan klason ne estas tia. Tiel do la apartigo okazas de la naskiĝo laŭ riĉeco. Tial povas atingi la superajn oficojn kaj la superan instruadon nur la infanoj naskitaj de riĉaj gepatroj. Ni do vivadas en reĝimo de privilegia Lernejo kaj de nur kelkajn celanta Instruado pro tio, ke duagrada instruado multekostas, kaj ke la tri instrugradoj estas dispartigitaj per nepenetreblaj muroj.

Povas esti, ke post duonjarcento ni konkiros sufiĉe gravajn reformojn sed en la momento, kiam ni tuj elŝiros la plej bonan frukton, tiam ia "lasta milito" dronigos nin en reakcion, kaj al ni perdigos la profiton de ĉiuj niaj antaŭaj luktoj.

* * *

Al la revoluciemaj sindikalistoj prezentiĝas klara batalo! En instruada servo same, kiel aliloke, oni faris al ni revoluciigan situacion, tial la lukto estos "demando pri perforto", la debato estos akra, vasta kaj publika.

Nia unua devo estas rekolekti la malnovan respublikan programon, dispecigitan de "neimagebla deputata Parlamento" naskita de la milito; nia devo estas montri Instruservon fiere starigantan la religiflagon de Jeanne d'Arc, la nunajn potenculojn starantajn kontraŭ Lernejo kaj ribelantaj kontraŭ opinirajto kaj historia vero. Per tio ni varbos al ni la sincerajn respublikanojn vojerarantajn, de la Respubliko naŭzitajn.

Kion vi faris? ni poste demandos al la Registoj, kion vi faris por plibonigado de la lernejaj ĉambroj? Kion vi faris por la popoluniversitatoj kaj edukado de la maturiĝantoj, por la bibliotekoj kaj publikaj legejoj? Kion vi projektas por la laikaj infangardejoj kaj laborista libertempo?

Ni iros eĉ pli antaŭen en la miksbatalo. Kion vi pretendas fari, ni demandos, por igi la lernejon senpaga kaj de ĉiuj atingebla? Laŭ kia mezuro vi deziras materiale helpi la malriĉajn gelernantojn kaj iliajn gepatrojn? Kion al ni vi proponas por forigi la originan malegalecon pri instruado? Kiam do vi ĉesos helpi al divastigo de l'Eklezia Lernejo? En kioma jarcento via prizorgo celos ne plu kazernon sed Lernejon?

Sur la vojo al nia idealo dum halto, ni batalos por la neoficialaj geinstruistoj, por la junaj kolegoj, por ni mem, por la ruinigitaj regionoj, por neŭtraleco. laikeco, opinirajto.

Pro la bedaŭrindega nenieco antaŭ niaj okuloj montriĝanta, ni diros al popolo, ke ni volas liveri Instruadon al la servo de la Homaro.

Tute novan unuagradan Instruadon ni volas ja restarigi, dum Respubliko la IIIa eĉ ne provas plifortikigi la malnovan konstruajon, pro embarasiteco per militŝuldoj kaj novaj elspezoj (8 miliardoj da frankoj por Armeo, 1½ por Ŝiparo).

Nova blovo estu vigligonta Lernejon, nune venenitan de difektita kaj enfermita aero.

Kaj fine ni povos konceptigi la popolon pri l'estonta Lernejo, la "Uniforma Lernejo de Laboro", kie oni iniciatoras la junajn generaciojn precipe al la vivaktiveco, sed ankaŭ kie oni ĉerpas inteligentojn kaj karakterojn por ilin direkti, sen ia proriĉeca distingo, al la duagrada kaj triagrada instruado . . . . je profito plej granda, al ĉiuj kaj al ĉiu!

---

# Ĉe niaj "mi-frati"

Tial ke nia ĉefa celo ne estas propagandi esp.on sed uzi internacian lingvon cele al atingo de nia idealo, estus tute indiferente por ni ĉu tiu lingvo estus "ido", "esperantida", "interlingua" k. t. p. Sed la simpla saĝo instruis nin, ke ne estas eble solvi la mondlingvan problemon starigante ĝin sur nure sciencan, lingvistikan bazon. Neniam la fakuloj interkonsentos unuanime pri iu ajn projekto. La forto de esp.o kuŝas do precipe en ĝia *Fundamento*, kiu anstataŭas la mankantan tradicion ĉe artefaritaj lingvoj.

Ĉiutage novaj faktoj venas apogi la konkludon de la simpla saĝo.

Ni jus ricevis gazeteton, kies celo estas propagandi novan lingvon, nomatan "Occidental". Kompreneble, laŭ ĝia aŭtoro, tiu sistemo superas ĉiujn aliajn ĝis nun aperintajn. La okpaĝa gazeteto estas ĉefe plena je kritikoj kontraŭ ido. Jen specimeno de tiu lingvo: "*Si noi regarda nur Ido quam evolution de Esp.o noi deve constatar, que su evolution ha marchat just in li sence opposit.*" Ni kredas, ke tio signifas proksimume: Se ni konsideras, ke ido estas evoluo de esp.o ni devas konstati, ke ĝia evoluo marŝis ĝuste en kontraŭan direkton.

Dume la idistoj (ĉiuj estas lingvistoj kaj "ciencozaj" kompetentuloj!!) asertas, ke nur pro nescio de ido la esp.istoj restas "fidelaj".

Tamen, ŝajnas, ke tiu perfektigita lingvo estas tre malfacile lernebla. Almenaŭ tia estas la opinio de *Marcel Pesch*, eldoninto de "l'Edukero". Pri sia propra sperto li diras: ". . . Se, post unu jaro da ĝisfunda lernado, mezinteligenta homo, scipovanta kelke da fremdaj lingvoj, kaj havanta la spiriton ekzercita per pluraj jaroj da praktikado de esp.o, ne ankoraŭ plene scipovas idon, nu vere tiu lingvo estas malfacila. Kaj neniam ĝi povos fariĝi la lingvo internacia de mezinstruitaj homoj . . . .
Mi do inklinas pensi, ke la lernado de esp.o estas pli rekomendinda ol tiu de ido . . . ." *Hæ neque affirmare, neque refellere opera pretium est* . . . .

Nu, se mi, nekompetentulo, kuraĝus havi opinion pri la demando mi dirus: La tasko de la lingvistoj estas nur esplori kiel funkcias la vivantaj lingvoj. Ni uzu kiel eble plej ofte, zorgeme kaj klare nian lingvon; ni atentu ĉefe pri la perfekte internacia kompreneblecο de nia stilo; ni lasu la fanatikulojn kriegi je profanado de l'*Fundamento*, kiam ni uzas novajn formojn; unuvorte ni *vivantigu* nian lingvon — kaj tre skeptike ni aŭskultu la sciencoplenajn teoriistojn . . . .

*Solulo*

# Ni ellernu la lingvon

## Pri la vortfarado

Decido de Akademio kaj Lingva Kommitato (1913).

1. La Akademio opinias, ke la vortfarado en Esperanto estas fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto, kaj ne sur tiel nomitaj "reguloj de derivado", ke reguloj de derivado malutilus al la lingvo, agante kontraŭ normala funkciado, ke tiaj reguloj alportus arbitrajn elementojn, ĝenantajn por la skribata lingvo kaj malutilajn por la parolata lingvo.

2. La Akademio opinias, ke kelkaj aŭtoroj trouzas sufiksojn: tio estas preskaŭ neevitebla en la parolata lingvo, sed tio estigas la skribatan lingvon nenecese peza. La kaŭzo de tiu trouzo kuŝas en la fakto, ke nevole oni ofte tro insistas sur ĉiu esprimota ideo, por ĝin penetrigi pli forte en spiriton de l' aŭskultanto aŭ de l' leganto. Ĉar aliflanke, oni ne devas tiom ŝparegi la sufiksojn, ke la vortoj fariĝas nekompreneblaj, estas konsilinde difini la limojn inter kiuj oni devas resti, tiamaniere ke oni lasos al arbitro kaj al personaj preferoj rolon kiel eble plej malgrandan.

La Akademio do rekomendas al la Esperantistaj aŭtoroj, ke ili sekvu la du jenajn principojn, kiuj kontraŭstaras unu la alian kaj estas la logika bazo de vortfarado en Esperanto:

*a)* **Principo de neceso**: *En konstruon de vorto oni devas*(1) *enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto.*

*b)* **Principo de sufiĉo**: *Se la ideo tiamaniere esprimata estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti eljetata kiel neutila kaj nenecesa.*

(1) La verkintoj de la ĉi-supraj principoj malobeis ilin en tiu kazo: *Konduki* sen la prefikso *en* plene *sufiĉus* por klare montri la ideon. *Red.*

## Berlinanoj atentu!

Por fondi S. A. T.-grupon en Berlin ĉiuj S. A. T.-anoj kaj gelegantoj de S. R. loĝantaj en Grand-Berlin estas invitataj al kunveno, kiu okazos mardon, 20. junio, vespere je la 7½ h, Weinmeisterstr. 16/17 (Sophien-Lyzeum).

*O. Fischer, H. Manske, O. Steinfurth.*

## Leterkesto:

Kdo *Hermann* (Lodz) Mi bone ricevis viajn 11 abonojn. Dankon.

Kdo *Jankovic* (Zagreb). Mi kvitancas la ricevon de viaj du reabonoj por 1922.

Kdo *Zidek* (Wien). Mi sendis de la Januara no, S.R. al viaj 13 abonantoj.

Kdo *Ŝapiro* (Bialystok) el la 16 respondkuponoj ricevitaj 8 estas senvaloraj. Vidu la noton "Atentu".

# IVa Kongreso de Germana Laborista Esperanto Asocio

Ĝi okazis en Düsseldorf de la 14a ĝis la 17a de aprilo. En sia malferma parolado Kdo *Schneider* raportis pri la malfacilajoj renkontitaj kaŭze de la militistara okupado franca. Post multaj klopodoj li tamen ricevis permeson, kondiĉe ke dum la Kongreso ne estu pritraktataj politikaj temoj. Du kriminalpolicistoj ĉeestis la kunsidojn. Pli agrable por la kongresanoj estis ekscii, ke la urbo Düsseldorf donacis al la Kongreso *10.000 markojn.*

Ĉeestis 55 delegitoj kun 112 mandatoj. Laŭ raporto de Kdo *Hegewald* videbliĝis, ke antaŭ la milito la Asocio havis 62 grupojn kun 1180 gemembroj; dum la milito 440; ĝis la Kongreso en Hannover (la postmilita) 565 kaj nun *85* grupojn kun *2000* gemembroj. Konsiderante ke nun regas en Germanio malbona valuto kaj mizera situacio por la laborista klaso, tia resultato estas tre kontentiga.

La temo pri internacia organizado estis vigle diskutata. 28 paroladontoj sin anoncis por partopreni la diskutadon. Ŝajnas ke la celo de S.A.T. estas ankoraŭ iom konfusa en la spirito de multaj kamaradoj. Kdo *Köckeritz*, je la nomo de la Dresdena grupo, proponis ke G.L.E.A. malstariĝu; ĉiuj grupoj simple aniĝu al S.A.T. Kdo *Sproek* subtenis la opinion, ke nacia kaj internacia organizaĵoj povas bone kune kunekzisti; Kdo *Deubler* deziras, ke oni enŝovu en la statuto de S.A.T. la vortojn "propagandi kaj instruadi". Kdo *Lerchner* reĝustigis kelkajn neverajojn kaj klarigis kelkajn punktojn; Kdo *Schneider* diris ke ni ne bezonas internacian organizaĵon; ke S.A.T. ĝis nun ne faris praktikan laboron — forgesante, ke ĝi apenaŭ ekvivas kaj ke estas tute malsaĝe postuli de infano, ke ĝi laboru kiel maturulo; aliaj Kdoj diris ke G.L.E.A. devus kontakti kun aliaj fratorganizajoj — — — kiuj fakte ne ekzistas en aliaj landoj! Je la nomo de la Leipziga Grupo, Kdo *Voigt* proponis, ke la Asocio abonu por ĉiu membro la gazeton *Sennacieca Revuo*, kaj oni enmetu en la koncernaj ekzempleroj germanlingvan aldonon. Tiu propono efikis kiel fulmo el serena ĉielo ĉar neniam antaŭe oni estis pritraktinta la aferon en la presorgano de G.L.E.A. Per 40 voĉoj kontraŭ 1 kaj kelkaj voĉoj kun rezervoj la propono de Voigt estis akceptata. Per tio multaj aliaj proponoj fariĝis senvaloraj. La Dresdena propono estis malakceptata per 75 voĉoj kontraŭ 37.

Post parolado de Kdo *Victorin-Mainz* pri gazetservo oni fiksis la *aliĝkoston.* Ĝi estas: 5 M. por plenaĝuloj, 2.50 M. por viriñoj kaj junuloj. La pomonata *kotizo* estas: 5 M. por plenaĝuloj, 2,50 M. por virinoj kaj junuloj.

La nomo de la Asocio estis ŝanĝata. Ĝi estas nun: *Laborista Esperanto-Asocio por la germana lingvujo.* La Asociestraro troviĝas nun en *Breslaŭ.* Ĝia prezidanto estas Kdo *Keller.* La redaktoro de la informilo estos Kdo *Sproek.* La asocia librejo troviĝos en *Leipzig.* En *Düsseldorf* funkcios, sub gvidado de Kdo *Schneider,* propaganda komisiono. La sekvonta Kongreso okazos dum 1924 en *Chemnitz.* — Laŭ raporto (mallongigita) de Kdo *Lerchner.*

# KRONIKO

**Aŭstrio**

*Linz:* La 25—26 marto la aŭstria laboristaro konferencis por fondi la unuiĝon "Aŭstria laborista Ligo". Kdo dro *Jetzinger* prezidis. Ĉeestis 35 delegitoj el 6 distriktoj. Kdo *Zimmermann* (Wien) priparolis la evoluadon de la *Laborista Esperanto Asocio* en Wien. Kdo *Stöber* (Linz) raportis pri la movado en Linz, en Supra Aŭstrio kaj en la ceteraj aŭstriaj distriktoj. En ĉiuj oni trovas grandan nombron da interesantoj, sed malgrandan nombron da instruantoj. La esp.o. parolado de Kdo

dro *Jokl* de la Viena delegitaro estis akceptata kun entuziasmo, same tiu de Kdo *Deubler* el Munĥeno. Kdo *Schade* (Wien) raportis pri la ĝisnuna procedo de Esp.o. Estis tralegataj la multegaj bondeziroj, skribe kaj telegrafe senditaj el diversaj landoj. Post tio Kdo *Zimmermann* konigis pri la socialistaj gazetoj en Aŭstrio, kiuj nun favoras Esp-on. La ĉefreferaton prezentis Kdo Stöber. Li parolis pri la neceseco de Esp.o por la edukado al internacieco. Por la politikaj kaj ekonomiaj opinioj ne havas intencon kaj ne volas la aŭstriaj laboristoj batali en la *Esperanto Ligo:* La kunlaboro kun ceteraj asocioj dependos sole de ilia konduto. Poste estis pritraktataj la statutoj de la "Aŭstria Laborista Ligo". Fine Kdo Deubler pritraktadis la temon "Mondorganizacio en la kadro de S.A.T.", kiel ŝlosilo al la pordoj de internaciismo.

La kongreso mem kaj la bone vizitata literatura ekspozicio atestis la intereson de la popolo kaj gajnis amason da interesiĝantoj. Pro tio oni devis aranĝi novajn esp-ajn kursojn.

La sidloko de la "Aŭstria Laborista Ligo" estas: *Linz*, Humboldstr. 46.

**Belgio**

*Bruxelles:* Okaze de la Kongreso de la *Federacio* de la *Artoj, Beletristikoj* kaj *Sciencoj*, la ĉi-tiea S.A.T. grupo aranĝis en la kongresejo ekspozicion de esperantaĵoj, kiu tre interesis la kongresanojn. Cetere la Kongreso alprenis rezolucion favoran al esp-o. Ni dankas al So *Banville d'Hostel*, la Sekretario de la Federacio, pro lia afabla permeso pri aranĝo de nia ekspozicio. Ĉiu interesato estu sciigata ke oni povas ekinterrilatiĝi kun la ĉi-supre nomita organizaĵo pere de esp-o. La adreso estas: 38 bis rue Fontaine *Paris* (9).

**Bulgario**

*Plovdio:* La gazeto "junulo" enpresis priesperantan artikolon de Kdo *Mateev*, sed la redaktoro aldone enpresis malkuraĝigan noton por la eklernado de nia lingvo. Inter alio li skribis: "Povas esti danĝere, ke la junularo estu tirata al esp-o. Ĝi havas pli urĝajn taskojn hodiaŭ, t.e. partopreno en la grandaj politikaj okazintaĵoj." Unu fojon pli, ni konstatas, ke la gvidantoj malatentas nian agadon. Ni do ĉiam pli vigle devas ataki ilin, demonstrante, ke ne povas esti vera Internacionalo sen komuna interkomprenigilo. Sed por ke sukcese ni povu fari tian propagandon estas unue necese, ke ni, esp-istoj, estu la plej klaskonsciaj batalantoj — K.M.

**Ĉekoslovakio**

*Plzen-Letná*: Antaŭ nelonge estis starigata "Laborista Ligo Esp-a", kiu havas kelkajn sekciojn en la ĉirkaŭaĵo eĉ alie. Esp. kurso estis vizitata de preskaŭ 100 gelernantoj. Ili nun deziras korespondadi kun ĉiulandaj kamaradoj. — Laŭ komuniko de Kdo *Antoni Rendl.*

**Jugoslavio**

*Split*: Nia movado komencis jam en 1908, sed nur en 1920 ĝi antaŭenmarŝis per senlaca agado de kelkaj fervoruloj. Nun funkcias 5 kursoj. Por helpi al nia propagando ni tre bezonas, ke oni sendu al ni ĉu monon, ĉu librojn, ĉu gazetojn k.t.p., ĉar ni estas tre malriĉaj kaj deziras propagandi esp.-on precipe inter la Laboristaro. Ni aranĝas por la 17 Julio poŝtkart- kaj letervesperon. Ĉiu sendinto ricevos respondon. Ĉion oni sendu al la jena adreso: Kdo *Rolf Rupĉiĉ*, poŝtsekretario Palmino 9, *Split.*

---

*Ĉiuj abonantoj,* **kies abono finiĝas kun tiu numero,** *bonvolu kiel eble plej baldaŭ sendi sian reabonon por eviti al si interrompon en la ekspedo de la Revuo.*

*La Administracio*

# Sennacieca Asocio Tutmonda

*23. Rue Boyer, Paris-XXe*

## OFICIALA INFORMILO

**Celo:** *Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la statuton).*

**Jarkotizo:** *Laŭ valoro de unuhora salajro meza* = **Anglio,** *17 pencoj;* **Aŭstrio,** *85 kr.;* **Belgio** *kaj* **Francio,** *2,50 fr. fr.;* **Bulgario** *kaj* **Rumanio,** *8.50 lev;* **Ĉeĥoslovakio** *kaj* **Jugoslavio,** *7 kr.;* **Danio, Norvegio** *kaj* **Svedio,** *1,70 kr.;* **Germanio** *kaj* **Finnlando,** *7 Mk.;* **Hispanio,** *2 pes;* **Hungario,** *17 kr.;* **Italio,** *3,40 lir.;* **Nederlando,** *0,85 Guld.;* **Polio,** *85 Mk.;* **Svisio,** *1,70 fr. sv.;* **Usono,** *35 cend., k.t.p.*

*Membreco kun jarabono al «Sennacieca Revuo»: Multobligu la tarifon de membro per 4. — Ekz.: en Germanio, membro pagas 7 Mkg., abonanto 25 Mgk., membro-abonanto 28 Mkg.*

*(La landoj, kies monkurzo estas malfavora rilate al franca franko, pagu prefere per naciaj monbiletoj, en registritaj leteroj; la aliaj laŭvole).*

*

Dum tiu-ĉi monato, nur 44 aliĝoj. Niaj varbistoj dormas . . . aŭ eble niaj gratuloj lastaj tiklis ilian modestecon, kaj ili strikas!! — ho, certe ne; ili momente ripozas por akiri novan ardon, kaj ne longe ni atendos por enrigistri brilajn rezultatojn de ilia propagando.

Cetere, iuj Kamaradoj profitas la ripozon de niaj pioniroj por sin mem varbi: iam ni plendis pro la silento de la Portugalaj esperantistoj, kaj jen, senaverte ni ricevas 5 aliĝojn (Kdo Costa Francisko, rua da Arrabida 84-1a-3a, Lisbono). Nur la unua paŝo estas peniga; verŝajne tiu "kvino" generos grupon pli multnombran.

En Wien 8 novaj membroj (tie ankaŭ la unua paŝo estis peniga) Bruxelles 3, Ĝeneve 1, Berlin 1, Philadelphia 1, Czestochowa 1, — Izoluloj en Nijnij-Novgorod, St. Bel, Le Havre, Levallois, k.t.p. Unu nova membrino dank' al Kino Pemberton Beatrice Green Howarth, Farm Cottage, Near-Accrington (Anglio). Ni finu tiun nomenklaturon per la grupo de Leipzig kiu havas nun 82 (okdek-du) membrojn.

*

Ŝajnas utila atentigi la Kamaradojn pri la pago de la kotizoj, abonoj, k.t.p. Ekz.: de Ĉekoslovakio ni ricevis ĉekon da 25 kronoj aĉetita ĉe banko de Hradek-Kralowe, kaj ŝanĝebla nur ĉe iu ajn banko de Ĉekoslovakio. Ni do povas ŝanĝi tiun ĉekon nur pere de iu franca banko, kiu postulas de ni 2 internaciajn poŝtafrankojn, plus maklerpagon, tiel ke ni enspezas nur proks. 4/5 el la valoro de tiu ĉeko.

Alia ekzemplo: iu germaniano sendis al ni 32 Mk. per poŝtmandato (ja, tiu pagsistemo estas ree permesata inter Germ. kaj Fr.). Unue la franca poŝto konvertis la 32 Mk. en fr. frankojn laŭ ĝia arbitra kurzo (t. e. 3 fr. = 100 Mk., anstataŭ 3,80 = 100 Mk, kiel estis la tiama kurzo oficiala), kaj plie postulis de ni pagon da 0,25 fr. (kiel por ĉiuj internaciaj poŝtmandatoj). Fine ni enspezis 0,75 fr.fr.!!

Do, por eviti tiujn malgajnojn, ni insiste konsilas pagi per ŝtataj monbiletoj en registrita letero. Tiel ni ricevas la efektivan valoron de la pago; kaj plie, ni povas ŝanĝi tiujn monbiletojn kiam la kurso estas favora.

Ni adresas tiun konsilon precipe al Kamaradoj kies monvaluto estas malsupera rilate al franca franko. La aliaj (Anglianoj, Amerikanoj, Hispanianoj k. t. p.) uzu iun ajn manieron. Sed, *ĉiukaze* la ĉekoj estu ŝanĝeblaj en Francio, alivorte: francia estu la banko tratita.

La sekretario de S.A.T.

1 majo 1922



# KORESPONDADO

**TARIFO: Unu enpreso, 0 fr. 75. — Tri enpresoj, 2 fr. Dek-du enpresoj, 6 fr.**

*MALLONGIGOJ:* L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* Esp-ajo = *Esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

**Belgio**

Kdo *Léon Bergiers,* 11 Rue Lauwers, *La Hulpe* (Province de Brabant). L, PK, k. ĉ. l.

**Bulgario**

Kdo *Petro Stoisnov,* 23 Str. Avksenti Veleŝki, *Plovdio.*

**Ĉeĥoslovakio**

Kdo *Antoni Rendl* (21 jara), vilao „Kukaĉka", *Plzen-Letnâ,* prezidanto de Laborista Asocio Esperantista, pri socialista laborista movado, politika kaj socia vivo de laboristaro, pri naturaj belecoj kaj turismo, k. ĉ. l. fraŭlinoj, ĉiam tuj respondos.

Kdo *Rudolf Tentura,* vilao „Kukaĉka", *Plzen-Letnâ,* pri naturaj belecoj kaj turismo k. ĉ. l. gesamideanoj. Ĉiam respondas.

Kdo *Francisko Tomâŝek,* Riegerstrato 187, *Plzen-Letnâ,* k. ĉ. l.

Kdo *Alois Dolejŝi,* Havliĉekstr. 129, *Plzen-Letnâ.* k. ĉ. l.

Kdo *Taclav Trla,* Jungmanstr. 264, *Plzen-Letnà.* k. ĉ. l.

Kdo *Edward Stupka,* Jungmanstr. 130, *Plzen-Letnâ.* k. ĉ. l.

Kdo *Jaroslav Brejcha,* Jungmanstr. 106, *Plzen-Letnâ.* k. ĉ. l.

Kdo *Francisko Kalny,* no 11, *Plzen-Lobzy.* k. ĉ. l.

Kdo *Tilhem Prexl,* no 13, *Plzen-Lobzy.* k. ĉ. l.

Kdo *Adalbert Martinek, Ejpovice* no 55 apud Plzen. k. ĉ. l.

Kdo *Tâclav Liŝka, Bukovec* no 56 apud Plzen. k. ĉ. l.

Kdo *Tâclav Fiŝer, Nyrany* no 320 apud Plzen. k. ĉ. l., PM kaj PI.

Kdo *Francisko Jukl, Ĉervené Poriŝi* no 34 apud Ŝvihov. Pri naturaj belecoj, interŝanĝas PK, ankaŭ L, k. ĉ. l. gesamideanoj, ĉiam respondas.

Kdo *Antono Zanela, Nyrany* no 127 apud Plzen. Kun edukistoj de poŝtkolomboj, interŝanĝas PM, k. ĉ. l. gesamideanoj (precipe Francio-Paris) ĉiam respondas.

Kdo *Michael Meiner,* bierfabriko, *Plzen-Burĝa.* Pri naturaj belecoj kaj vivrilatoj, k. ĉ. l. gesamideanoj.

Kdo *Josef Nosek* (biera-maltfaristo) en *Miroŝov* no 64 apud Rokycany. Pri naturaj belecoj kaj turismo, k. ĉ. l. fraŭlinoj. Ĉiam respondas.

Kdo *Taclav Todiĉka,* Méŝtansky pivovar, *Plzen.* Pri naturaj belecoj k. ĉ. l. fraŭlinoj.

Kdo *Michael Mathauser, Irhanov* no 62 apud Domazlice. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l. fraŭlinoj.

Kdo *Jan Petera, Obora* no 38 apud Ostromer. k. ĉ. l. fraŭlinoj, tuj respondos.

Kdo *Josef Sluka, Schiesglock,* poŝto Potscherad apud Postoloprt. k. ĉ. l. fraŭlinoj.

Kdo *Jakob Sejkot, Zâlezky,* poŝto Malenice apud Tolyn. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l.

Kdo *Francisko Stâdler, Svarko* no 18, poŝto Letiny apud Blovice. k. ĉ. l. fraŭlinoj.

Kdo *Tâclav Rainer, Drahlin,* poŝto Obeenice apud Pribram. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l.

Kdo *Jarko Tondrâĉek,* (19 jara), *Ĉervéne Peĉky* apud Kolin. Pri arto, muziko. k. ĉ. l. fraŭlinoj.

**Finnlando**

Kdo *K. J. Hakanen,* 2 linja 11 B, *Helsinki.* Per PI, k. ĉ. l., gelaboristoj korespondemaj.

**Francio**

Kdo *Ehm Marcel,* 43 rue des Batignolles, *Paris* 17e. k. ĉ. l. kamaradoj, L, interŝanĝas PK, PM.

Kdo *Spego,* poŝtrestante, *Puteaux,* Seine, Fraŭlo laboristo deziras ekinterrilatiĝi kun fraŭlino laboristino por komunisme vivi, malseriozulino sin detenu, skribi.

Kdo *Guyot René,* presisto, 29 rue des Royaux à *Joinville* (Haute-Marne). k. ĉ. l., L aŭ PK precipe kun Rusio kaj Japanio.

**Germanio**

Kdo *Otto Bäßler,* Gerberstr. 24 H.II., *Leipzig,* deziras interŝanĝi sciindaĵojn pri la laborista movado k. ĉ. l.

Kino *Frinjo Lehmann,* Eisenacher Straße 54, *Leipzig-Gohlis.* Pri gimnastiko k. ĉ. l.

Kdo *Puff, Ludwig,* Schwalbacher Str. 64 II, *Frankfurt a. M.* Pri seriozaj temoj k. ĉ. l. milit-kripligitoj.

Kdo *Arthur Büttner* (kompostisto), Große Plauensche Str. 37, *Dresden-A.* L kaj PK. k. ĉ. l.

**Rusio**

Kdo *Mikaelo Valentinov,* Ĉudovoskoj 6, *Moskvo.* k. ĉ. l.

Kdo *Bazilo Averin,* 3 Bakald No 30, *Astraĥanj.* L, PK pri ĉio, interŝanĝas, PM, esp. gaz. literaturon, ĉiam respondas.

Kino *Kondratjeva, Anna,* Zajaĉijastrov s-to, *Volgo Astraĥanj.*

Kino *Kasatkina, L.,* sama adreso.

Kino *Lapseva, Klavdio,* sama adreso.

Kino *Usakova, Antonino,* sama adreso.

Kdo *Jasak, Bazilio,* sama adreso. PI kaj L kun interesiĝantoj pri vivo, esperanta movado kaj aliaj temoj.

Kdo *Ilĉjo, Petroviĉ Kalinin,* (studento), Zajaĉijastrov, s-to, *Volgo Astraĥanj.* PI kaj L kun interesiĝantoj pri elektra tekniko kaj alia novaĵo el tekniko.

Kdo *Paŭlo Koĉkin,* Revolucionaia str. No 4, *Urium,* gubernio Viatka.

Kdo *Vera Koĉkin,* (18 jara), sama adreso.

Kdo *Aleksandro Koĉkin,* (14 jara), sama adreso.

Kdo *J. Sapirŝtein,* poŝtkesto 23, *Gomel.* Interŝanĝas PM kaj esp. gaz. k. ĉ. l.

Kdo *Arkadio Kostanov,* Katoliĉeskaja 5, *Astraĥanj.* k. ĉ. l., L kaj PK pri vivkondiĉoj, novaj elpensaĵoj, naturo, religio, moro k. t. p.

Kdo *Fedor Savin,* Pristanskaja 6, *Astraĥanj,* (25 jara, ĉarpentisto). k. ĉ. l.

*Ujezda Kom. de Federacio de Junularo,* dez. koresp. esperante.

**Svedio**

Kdo *Adol Herlin,* Vardskolmen 16, *Sodertâje.* PK, PM, kun seriozaj kolektantoj, k. ĉ. l.

Kdo *Karl A. Faberman,* Marielund, *Södertâlje.* PK, PM, L, pri socia vivo, precipe kun kinoj, k. ĉ. l., krom Ĉeĥoslovakio kaj Germanio.

## Gimnastik- kaj sportuloj

Partoprenontaj la tutgermanan gimnastik- kaj sportfeston de l'laboristaro en Leipzig la 22.—25. de Julio 1922, sin anoncu ĉe "Laborista Esperanta Grupo Leipzigo". Oni adresu: Kdo J. Münch, Leipzig, Kapellenstr. 8,II.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG.